

CHR. HOUGAARD

OKAZAS NENIO

TRE FACILA LEGOLIBRO



ORIGINALE VERKITA EN ESPERANTO



OKAZAS NENIO

CHR. HOUGAARD

OKAZAS NENIO

TRE FACILA LEGOLIBRO

EGET FORLAG
1945

Presejo :
Hinnerup Bogtrykkeri (Danlando)

1. ĈAPITRO

La suno brilas. Estas somero. En la ĝardeno staras belaj arboj, arbustoj kaj floroj. La floroj odoras, kaj tial en la ĝardeno estas bonaodoro. En la ĝardeno kuŝas bela ruĝa domo, vilao. La vilao estas granda kaj aspektas riĉa. La tegmento sur la vilao estas nigra, sed ĝi brilas.

En ĉambro sidas la tuta familio. Sinjoro Grann legas. Ankaŭ la filo, Thor, legas. La mastrino trikas, ŝiaj manoj diligente laboras. Ankaŭ fraŭlino Mona laboras, ŝi brodas. La sepjara Lisa ludas sur la planko kun siaj pupoj. Ŝi parolas al ili, sed ili ne respondas, ĉar ili ne povas paroli.

Sur la planko en angulo kuŝas „Fokso“. Fokso estas hundo; ĝi estas tre grava estaĵo en la domo. Se fremdaj homoj venas al la pordo, ĝi tuj komencas boji, kaj ĉiuj scias, ke gastoj venas.

Ekster la domo brilas la suno, la birdoj kantas kaj la floroj odoras. En la domo ĉio kaj ĉiuj estas trankvilaj. Estas idilio. Sed la idilio ne daŭras. En la ĉambro estas ankaŭ muŝoj. La muŝoj zumas en la ĉambro, kaj la trankvilo kaj la paco estas for. Jen sidas muŝo sur unu nazo, jen sur alia nazo. Nun sidas muŝo sur la hunda nazo, kaj Fokso estas furioza, ĝi bojas per ĉiuj fortoj. La tuta familio tremas pro la forta bojado. Sinjoro Grann parolas al la hundo, sed la hundo ne estas obea. Lisa pro timo komencas plori, kaj larmoj fluas el la malgrandaj okuloj. La bela idilio ne plu estas.

2. ĈAPITRO

Sinjoro Grann prenas la hundon per la ĉeno kaj

iras kun ĝi el la ĉambro. La ploro ĉesas, sed la muŝoj ankoraŭ estas en la ĉambro, kaj nun unu el ili trovas la malgrandan nazon de la knabino. Per unu fingro ŝi forpelas ĝin, sed ĝi revenas fojon post fojo al ŝia nazo, ĉiuj provoĵ por forpeli ĝin estas vanaj. Thor vidas, ke la muŝo ĝenas la fratinon, kaj ĉar li estas bona frato, li volas helpi ŝin. Le prenas malgrandan bastonon kaj per ĝi li batas, sed en la sama momento la patro malfermas la pordon. La pordo trafas la manon de Thor, kaj li trafas ne la muŝon, sed la vizaĝon de unu el la pupoj kaj frakasas ĝin. Terura okazo. Lisa ploras. La ploro estas tre forta. La patrino riproĉas per fortaj vortoj. Fokso bojas en la alia ĉambro, ĉar ĝi ne scias, kio estas. Sed la malfeliĉa frato provas konsoli la fratinon kaj promesas al ŝi aĉeti novan, belan kaj grandan pupon, kiam li venos al la urbo. Lisa estas tre tre malfeliĉa homo, ĉar ŝi nun havas nur unu pupon; la alia ne taŭgas, ĝi ne havas vizaĝon. Mona formetas sian brodaĵon kaj iras el la ĉambro. Post momento ŝi revenas, kaj en la mano ŝi havas grandan, belan pupon. Ŝi diras al Lisa: „Se vi ne plu ploras kaj plendas, ĝi estas via pupo kaj ne mia“. La ploro tuj ĉesas, kaj la okuloj de Lisa brilas kiel du steloj sur la ĉielo en bela somera nokto. Lisa kun gaja rideto prenas la grandan pupon de la fratino per siaj malgrandaj fingroj. Mona ree prenas sian manlaboron. Sinjoro Grann prenas la gazeton kaj legas ĝin kun granda intereso, sed Thor legas romanon. La idilio denove regas en la ĉambro de la familio Grann.

3. ĈAPITRO

Dum kelka tempo ĉiuj sidas silentaj kaj laboras. Mona rompas la silenton; ŝi oscedas. La patrino rigar-

das ŝin kun granda miro. „Kion vi faras, infano? Ĉu ŝajnas al vi, ke estas konvena konduto, tiel oscedi eĉ sen ŝirmi la buŝon!“ „Ho, ne patrino, sed la vivo vere estas tiel teda, ke mi devas oscedi pro enuo“. „Kion ni devas aŭdi? Ĉu la vivo estas enua? Ĉu vi ne havas ĉion? Vi havas belan ĉambron baj hejmon, kaj se mankas al vi laboro, mi havas sufiĉe ankaŭ por vi.“

„Ne, patrino, al mi mankas nenio, ankaŭ ne laboro, sed tamen la vivo estas seninteresa — okazas nenio!“

Forta rido sekvas la elparolon de Mona: „Pri kio vi ridas, Thor?“ demandas Mona kun indigno en la voĉo. „Pri kio mi ridas? Ho, ve, kara fratineto, ĉu vere okazas nenio?“

„Ne, mi aŭdas kaj vidas nenion.“

„Eble vi ne malfermas la okulojn kaj la orelojn, kiam vi iras en la urbo. Hieraŭ brulis granda fabriko en la urbo; la brulado daŭris la tutan nokton. Unu el la fajrobrigadistoj ekhavis danĝerajn vundojn, kaj oni devis alvoki ambulancon. Kiam la ambulanco estis sur la vojo al la brulejo, ĝi trafis sojlon sur la strato pro tio, ke malsana sinjoro kuŝis tie sur la pavimo.“

„Jes, Thor, sed tio estas alia afero. Mi parolas pri nia mondo. Ĉi tie okazas nenio.“

„Ĉu ne? Antaŭ kelkaj minutoj muŝo eksidis sur la dolĉa nazo de nia fratineto, kaj mi prenis bastonon por murdi ĝin, sed anstataŭe mi murdis la pupon. Multoj larmoj fluis kaj ĉesis nur, kiam vi oferis vian plej karan pupon. Hieraŭ unu el miaj kunikloj naskis kvin idojn. En la sama tago mortis kvin el miaj kanarioj, do la bilanco estas en ordo. Cetere mi tute forgesis rakonti al vi, ke via kara amikino Marinjo en la ferio renkontis junan ĉarman sinjoron, kaj ili nun jam metis oran ringon sur la fingron.“

Jen fraŭlino Mona batas la plankon per malgranda piedo: „Thor, mi aŭdis sufiĉe!“

„Ĉu vere, fratineto, ŝajnas al mi, ke vi antaŭ unu momento diris, ke okazas nenio, kaj nun jam sufiĉas por vi!“

„Jes, sed estas nur bagateloj, pri kiuj vi parolas. La vera vivo estas neinteresa.“

4. ĈAPITRO

Nun interrompis sinjorino Grann. „Kial vi estas malkontenta. Vi kuras de unu festo al alia, kaj krom tio vi okupas vin pri multaj aliaj aferoj. Unu fojon en la semajno vi iras al dancinstruado, unu fojon al Esperanta kurso.“ „Hura,“ krias Thor subite. „Nun mi scias, kial ŝi estas malkontenta pro la vivo.“

„Kial do,“ estas la lakona demando de Mona.

„Ĉar vi dum 14 tagoj ne ricevis leteron de via amiko en eksterlando!“

„Ho, patrino, se ŝi montros al vi la foton de ŝia amiko, vi trovos lin tre ĉarma. Sed ŝi certe ne montros ĝin al vi, ĉar ŝi timas, ke vi forgesas, ke vi jam havas edzon.“

„Silentu!“ kriis Mona. „Estas nur babilaĉo, patrino, ne aŭskultu tion. Mi nur ricevis du kartojn de li kaj unu leteron, kaj kompreneble mi devis respondi al li. Cetere mi ne komencis. Li legis mian nomon kaj adreson en gazeto, kie ĝi estis kune kun la adresoj de la aliaj kursanoj. Ankaŭ la nomo de Thor estis en tiu gazeto.“

„Jes, mi ankaŭ ricevis leteron de japana knabino, sed bedaŭrinde ankoraŭ ne foton. Mi tamen esperas, ke ŝi estas bela kaj ĉarma, kaj mi vizitos ŝin kiel eble plej baldaŭ. Mi nur kolektas sufiĉan monon por la vojaĝo.“

„Ho, fanfaronulo,“ mokis Mona. „Via ĉarma amikino en Japanujo povos esti trankvila, vi neniam ĝenos ŝin per perzona vizito, ĉar malŝparema vi estas!“

„Ne, fratino kara, vi verŝajne unue ekhavos viziton, ĉar via amiko loĝas ne en Japanujo sed en...!“

„Patro,“ kriis Mona malfeliĉe. „Ĉu vi ne helpos min?“

„He, he,“ murmuris la patro malantaŭ la gazeto. „Por kia laboro vi bezonos helpon, filineto mia?“

„Ĉu vi ne aŭdis, ke Thor insultis min?“

„Mi diris nur la veron,“ ripostis Thor. „Sed eble la vero ĝenas vin, mi iam aŭdis, ke kelkaj homoj tre malŝatas la veron.“

„Nun mi helpos vin,“ eĥis malforta voĉo, kaj Lisa lasis la pupojn kaj iris al Mona por gardi ŝin kontraŭ pluraj atakoj.

„Jes, kompreneble ŝi helpos vin. Se vi donos al mi grandan pupon, ankaŭ mi certe estos je via dispo, kara Mona. Cetere mi ja antaŭ kelka tempo helpis vin, kiam vi skribis amleteron. Ĉu vi ne memoras tion?“

Mona nun ekkomprenas, ke la frato deziras nur inciteti ŝin. Ŝi turnas ŝin for de li kaj iras el la ĉambro sen pluaj vortoj.

5. ĈAPITRO

Mona kaj Thor sidas en la lernejo. Estas la Esperantakurso. Ĉiun merkredon ili sidas tie kaj studas Esperanton. Ili jam estas sufiĉe lertaj, ĉar ili partoprenis la du lastajn vintrojn. Kvankam Thor estas iomete maldiligenta, li estas tre lerta, ĉar li tre facile kaptas la gramatikon. Mona estas tre diligenta, sed tamen ne tiel lerta kiel li.

Thor tre ŝatas inciteti la fratinon, sed li tamen volonte helpas ŝin, kiam ŝi petas pri lia helpo.

La instruistino estas juna eksterlanda fraŭlino. Ŝi estas bela kaj tre ĉarma, kaj ŝi scias lerte instrui la gelernantojn.

Mona jam ekkomprenis, ke Thor tre ŝatas la instruistinon. Kiam la instruistino rekte alparolas lin, li ofte balbutas kaj ne povas respondi, eĉ se li scias, kion li respondu. Tio donis al Mona bonan armilon.

Se li komencas inciteti ŝin pro la amiko en eksterlando, kiam ili estas en la hejmo, ŝi tuj kaptas la okazon kaj komencas paroli pri la ĉarmega instruistino. Thor tiam tuj silentas.

Jen la unua horo pasis, kaj la gelernantoj havas la dekminutan paŭzon. Tiu tempo estas por ili tre interesa, ĉar tiam ili interbabilas pri multaj aferoj esperantaj. Kelkaj kunhavas leterojn aŭ kartojn. Preskaŭ ĉiuj gelernantoj korespondas kun eksterlanda amiko aŭ amikino. La leteroj kaj kartoj estas tre interesaj.

Fraŭlino Riedel, la instruistino, alvokis ilin: „Jen vidu, karaj gelernantoj, novaj leteroj alvenis. Kiu ankoraŭ ne havas korespondanton eksterlandan?“

„Mi, fraŭlino,“ respondas eta fraŭlino per malforta voĉo. „Sed mi kredas, ke mi ne povas skribi leteron al fremda homo. Devas almenaŭ esti juna knabino, ĉar mi neniam interŝanĝis leteron kun fraŭlo.“

„Aŭskultu, aŭskultu,“ krias la junaj sinjoroj. „Fraŭlino Sommer timas la virojn.“ „Ha, ha,“ fortaj ridoj sekvas la elkriojn.

„Ne, mi ne timas vin kompreneble, sed vin mi konas, la alian sinjoron mi ja ne konas,“ respondis la malkuraĝa fraŭlino kun ruĝaj vangoj.

„Kara fraŭlino Sommer, ne estu malkuraĝa,“ diris la instruistino por helpi ŝin kontraŭ la mokaj ridoj kaj

ridetoj: „Jen mi havas belan karton. La karton sendis juna fraŭlo, kaj li skribis la jenan: Mi lernas Esperanton de unu jaro, kaj mi jam lernis multon, sed mia instruisto diras, ke mi korespondu, korespondadu. Kiu helpos al mi? Mi estos tre danka, se mi ricevos nur malgrandan leteron, via. k. t. p.

„Rigardu fraŭlino, estas lernanto kiel vi. Estu kuraĝa kaj prenu la karton.“ Fraŭlino Sommer kun danko prenis la karton, kaj neniu plu ridis.

6. ĈAPITRO

La gelernantoj iras el la kursejo. Ili iras kune en grupetoj laŭ inklino kaj direkto. Mona kaj Thor akompanas la instruistinon. En la komenco ĉiuj silentas, ĉar la gelernantoj ne kuraĝas libere paroli. Post mallonga paŭzo diras fraŭlino Riedel: „Hieraŭ diris la prezidanto de la klubo, ke oni intencas aranĝi vojaĝon al eksterlando post la fino de la kurso.“ „Ho, estas tre interesa afero,“ diras Mona. „Mi ŝparos monon, kaj portoprenos se eble.“

„Ankaŭ mi partoprenos,“ diras Thor, „sed mi esperas, ke mi povos resti en la eksterlando longan tempon.“

„Bone,“ respondas fraŭlino Riedel. „Se vi diligente studos, vi estos instruisto, kaj vi povos resti en eksterlando dum unu tuta jaro.“

„Jes, sed mi ne estas sufiĉe lerta por esti instruisto.“

„Eble vi ne estas, sed vi estos sufiĉe lerta. Mankas al vi nur kuraĝo, kaj mi volonte helpos vin.“

„Vi estas feliĉulo,“ malafablis Mona. „Vi restos en eksterlando kiel instruisto, sed mi devos resti ĉi tie, kaj ĉi tie okazas nenio krom la ĉiamaj ordinaraĵ

aferoj. La vivo estas ĝojo kaj malĝojo, sed seninteresa ĝi estas.“

„Ho, kia pesimistino vi estas, kaj vi havas nur 20 jarojn. Se vi atingos la aĝon de 80 jaroj, vi havos ankoraŭ 60 jarojn por travivi.“

„Jes,“ ridas Thor, „nur hodiaŭ ŝi estas pesimista, morgaŭ aŭ postmorgaŭ venos la princo por forkunduki ŝin, kaj ŝi estos princino.“

„Ne aŭskultu tian babiladon, fraŭlino Riedel!“

„Ne estas babilado,“ protestas Thor, „mi scias, ke ŝi havas princon ie en eksterlando, kaj kompreneble li venos iun tagon, kaj Mona sopiras je tiu tago. Dum longa tempo ŝi ne ricevis leteron de la princo, tial ŝi estas pesimista.“

„Ho, li estas mensogulo. Estas nur pro tio, ke li iam helpis min, kiam mi skribis leteron al mia korespondanto.“

„Jes,“ krias Thor, „mi diktis al ŝi amleteron kaj ŝi sendis ĝin al la amiko, al la princo.“

„Eble vi, sinjoro,“ moketis fraŭlino Riedel, „tre lerte scias skribi amleteron. Ŝajnas al mi, ke vi estas iom malkuraĝa, kiam vi staras vizaĝon al vizaĝo kun knabino!“

Thor tute forgesas respondi al la lasta frazo de fraŭlino Riedel, kaj silentaj ili pluen iras. Ili disiras je strat-angulo.

Dum la nokto Mona kaj Thor sonĝas pri aventuroj en fremdaj landoj, kie ili renkontas strangajn homojn.

7. ĈAPITRO

Estas dimanĉo. La familio sidas en ĉambro en vilao „Espero“. Krom la familio estas gasto en la ĉambro. La gasto estas fraŭlino Riedel.

La gejunuloj babiladas. Sinjorino Grann sidas kun la kutima manlaboro, kaj la malgranda Lisa ludas kun siaj pupoj. Sinjoro Grann legas la dimanĉan gazeton. Ĝi certe estas tre interesa, ĉar li diligente studas ĝin. Kelkfoje li murmuras pri la enhavo, sed neniu atentigas pri tio, ĉar tio estas lia kutimo.

Estas paŭzo en la babilado. Thor tamen rimarkas la murmuron de la patro kaj por havi ion por diri, li demandas la patron, kio estas.

„Ne estas, sed eble baldaŭ estos,“ estas la lakona respondo de la patro.

„Kio estos, patro?“

„Milito, kompreneble. Dum kelkaj jaroj homoj ne faris militon, sed nun ili kolektis tiom da municio kaj malamo, ke estas necese por ili fari malpacon.“

„Jes, sed tio ne koncernas nin, patro. Ni ja estas pacemaj homoj ĉi tie, kaj ni ne havas malamikojn,“ diras Mona kun certeco en la voĉo.

„Ne, ne koncernas nin ankoraŭ, infano. Vi kredas, ke vi estas tute logika. Se la potenculoj komencos militi, ne koncernos ilin, ĉu la milito okazos en ilia propra lando aŭ en la najbara lando. Tiaj estas la homoj, filino mia.“

„Estu afabla traduki al mi,“ petis fraŭlino Riedel. Mona tradukis la vortojn de la patro. Fraŭlino Riedel dankis kaj petis ŝin diri al la patro, ke li, laŭ ŝia opinio, tute pravas.

Nun Thor ne plu povas sin reteni. „Vi certe pravas, ke estas egale al la potenculoj, kie la milito okazos, sed vi forgesas, ke ankaŭ ni havas soldatojn ĉi tie. Se malamikoj venos tien ĉi, niaj soldatoj montru al ili, kiel ni scias gardi nian landon.“

„He,“ la tono de la patro estas moka kaj duba. „Vi

estas tre saĝa, Thor, sed nia malgranda armeo signifos nenion en tia giganta batalo.“

„Se nia armeo dum milito havos nenian signifon, kial ni do havas ĝin dum paco?“

„Jes, kial, filo mia? La politikistoj postulas kaj decidas.“

„Kaj kion ni faras, patro,“ diras Thor indigne.

„Tion mi scias, Thor. Ni pagas la kostojn kaj impostojn!“

„Nu, gekaruloj, kial diskuti tiajn aferojn,“ ridetas sinjorino Grann milde. „Ankoraŭ estas ja paco tie ĉi, se vi ne faros malpacon. Dum la lastaj jaroj ni ofte legis, ke nun eksplodos milito, sed saĝas al mi, ke ĝis nun estis nur onidiroj. La scio pri la estonto apartenas al Dio, kaj Li malŝatas la militon.“

„Jes, kara edzino, sed Li donis al la homoj liberan volon. Tion ne forgesu.“

8. ĈAPITRO

Estas en la frua mateno. La suno ekiros post kelkaj minutoj sur la ĉielon. La birdoj jam ekmaldormis kaj komencis kanti, ĉiu per sia beko, sed la kantado estas bela muziko.

Sur la muro de la vilao pendas sturnkesto. Antaŭ la sturnejo sidas sturno sur la stangeto. Ĝi fajfas. Ĝi estas gaja kaj matenfrea, kaj tion ĝi rakontas al la tuta ĉirkaŭaĵo. Pli kaj pli rapide la triloj eliras el la gorĝo. Dum mallonga momento ĝi haltas kaj ĉirkaŭrigardas por vidi, ĉu iu ŝatos konkuri kun ĝi, sed nur malbela kaj ĉifona pasero sidas apude en arbo, kaj tiu kompatindulo ja ne kapablas konkuri kun ĝi.

La suno brilas. Malforta blovo iras tra la foliaro, sed la folioj apenaŭ sin movas. La ĉirkaŭaĵo estas

trankvila kaj paca. El la apuda kamparo venas muĝo de soleca bovido.

En la domoj la homoj ekmaldormas kaj komencas la tagan vivon. En la strato aperas la unua signo de la tago, la laktovendisto.

Ankaŭ en la domo de Grann oni levis sin el la nokta kuŝejo. Ĉirkaŭ la tablo oni sidas kaj manĝas la matenan manĝon. Sinjoro Grann havas kiel ordinare antaŭ si la gazeton; estas la matena eldono.

Li grumblas pri la enhavo. „Nur malbonaj aferoj estas en la gazeto hodiaŭ. Murdo, krimo, milito.“

„La mondo vere estas malbona,“ respondas sinjorino Grann, sed la milito feliĉe estas nur sur la papero, almenaŭ ĝi ne estas proksima al nia pordo, tion mi scias. Kial do mediti pri ĝi?“

Dum kelkaj minutoj estas tute silente en la ĉambro. Neniu malfermas la buŝon. Ekster la domo fajfas kaj triladas la sturno eble pli forte kaj vigle ol iam.

Subite Thor levas la kapon kaj streĉe aŭskultas: „Silentu,“ li diras malgraŭ tio, ke neniu diris eĉ vorteton.

„Kio estas?“ demandas ta patrino. Ĉu vi havas halucinacion?“

„Ĉu vi ne povas aŭdi la strangan sonon?“

„Jes,“ mokas Mona, „estas granda ŝargauĉo sur la ĉefvojo, frateto. Ĉu vi neniam antaŭe aŭdis tian sonon?“

Sinjoro Grann metas la gazeton sur la tablon kaj atente aŭskultas: „Ne estas auĉo, li diras, „estas flugmaŝino aŭ pli ĝuste flugmaŝinoj!“ Ĉiuj aŭskultis silentaj.

„Nu, gekaruloj, manĝu, aŭ la manĝaĵo estos mal-

varma. Ni ofte vidis flugmaŝinon. Estas certe amato.

Thor subite eksaltas de sur la seĝo kaj kuras al la fenestro: „Jen vidu,“ li krias. „Unu, du tri — ne estas eble nombri ilin. Rigardu, ili estas nigraj kaj tre grandaj. Estas transportmaŝinoj,“ li diras saĝe.

„Kien ili iros?“ demandas Mona kun miro en la voĉo.

„Kaj de kie ili venas?“ aldonas Thor.

„Tion mi ne scias, sed mi supozas, ke ili ne venas kun bonaj novaĵoj,“ respondas sinjoro Grann per serioza voĉo.

La kalendaro montris la 9'an de aprilo.

9. ĈAPITRO

Amasoj da flugmaŝinoj tondras super la domo. La familio finmanĝas rapide. Neniu parolas. Ĉiu sidas silanta kun siaj pensoj kaj supozoj. Sinjoro Grann ekstaras. „Nu, gekaruloj. Ni iros, ĉiu al sia celo kaj laboro kaj revenos — espereble posttagmeze. Bonan matenon!“

Ili iras el la hejmo. Sinjoro Grann, Mona kaj Thor al sia laboro: Lisa iras al la lernejo; nur sinjorino Grann restas hejme.

La du gejunuloj iras per biciklo al la laboro. Ĝis la urbo ili iras laŭ la sama vojo. Ĉie staras grupetoj da homoj kaj interparolas. La flugmaŝinoj ankoraŭ ŝvarmas super la urbo. Ili iras tiel malalte, ke ili estas tre videblaj. Mona kaj Thor provas diveni la kaŭzon de tiu stranga vizito. Thor opinias, ke ili iros en iun ajn landon.

„Ĉu vi kredas, ke estas militmaŝinoj, Thor?“ „Ŝajnas al mi, ke ili ne havas armilojn.“

„Ne,“ respondas Thor kun ŝaĝa mieno. „Tion ili ne havas, ĉar estas transportmaŝinoj.“

„Kion ili transportas?“

„Soldatojn amase, fraŭlineto.“

Jen ili venis al angulo, kie la trafiko estas tiel kaosa, ke estas preskaŭ neeble pluen iri. La homoj staras grandamase sur la strato kaj la trotuaro. Oni diskutadas laŭte. Ĉiu havas sian propran opinion, kaj neniuj scias, kio okazis.

Subite venas policista aŭto el flankaj strato. Ĝi haltas antaŭ la popolamaso, kaj policisto ekparolas al ili per laŭtparolilo: „Jen proklamo de la registaro kaj la reĝo. Fremda armeo ekokupis matene nian patrujon. La registaro petas ĉiujn, ke oni sin konduku trankvile kaj dece. Pluraj informoj sekvas.“

Ĉiuj silentas kaj staras senmovaj sur la strato kun seriozaj mienoj. Multaj ankoraŭ ne perceptis la tutan signifon de tiu proklamo, sed ĉiuj supozas, ke malbona tempo sekvas.

La homoj disiras. Mona kaj Thor ekbiciklas, sed estas preskaŭ neeble veturi tra la stratoj, ĉar homoj amasiĝas tie.

Gejunuloj per biciklo aŭ sen ĝi. Maljunaj kaj dikaj sinjorinoj en matenaj vestoj staras sur la trotuaroj. Laboristoj kaj kontoristoj urĝas en ĉiujn direktojn. Ĉie oni malfermis pordojn kaj fenestrojn por ekscii, kio okazis. Oni de la strato povas aŭdi, ke la radio en ĉiu hejmo rakontas pri tio.

Ĉiuj venas neprecizaj al sia laborejo, sed tio ne gravas, ĉar neniuj tamen povos tuj eklabori. Unue oni devos rakonti ĉion, kion oni scias, antaŭ ol estas eble komenci la laboron.

10. ĈAPITRO.

La tago rapide pasas. Neniu diligente laboras. Nur la onidiroj flugas de buŝo al buŝo, la kreantoj de oni-

diroj laboregas. Neniu scias ion konkretan, sed ĉiuj aŭdis pri tute certaj okazaĵoj tie kaj tie.

Nervozaj homoj staras antaŭ la bankoj amase. La karan monon ili volas savi. „Oni ja ne scias, ĉu la fremduloj prenos ĝin!“

Multaj pakas la plej necesajn vestojn en la kofrojn kaj ekiras per aŭto, trajno aŭ biciklo en la kamparon, ĉar ili supozas, ke tien ne venas la fremdaj soldatoj, kaj tie oni almenaŭ havos sufiĉan manĝaĵon en la provizejoj.

Ankaŭ antaŭ la fenestroj de la gazetoj amasiĝas urbanoj. Sed neniu novaĵo aperas en la fenestrojn, nur la proklamaĵo pendas en unu fenestro, kaj ĝin oni jam scias parkere. La grupoj vigle diskutadas la problemojn. Jen staras unu grupo, jen alia. Kvankam nenio ĝis nun aperis surpapere, kelkaj scias ekzakte, ke la nacia armeo forte kaj bonŝance batalis kontraŭ la fremduloj, kiuj falis amase sur la batalkampo. Aliaj scias, ke la reĝo kaj la registaro fuĝis, sed ne kien ili iris. Maljuna virino laŭte ploras, kaj kiam oni demandis ŝin, kial ŝi ploras, ŝi balbutante konfesas, ke ŝia fratino en proksima vilaĝo promesis al ŝi veni venontan sabaton kun granda peco da ŝafviando, sed nun ŝi kompreneble ne kuraĝos veni ĉi tien.

Eksplodas forta rido, kaj la kompatinda virino forkuras, dum kiam la larmoj trilas malsupren laŭ la ne tre puraj vangoj.

Mona kaj Thor renkontis unu la alian en la kutima renkontejo. Mona estas kiel la plej multaj virinoj tre ekcilita. Ŝi kredas eĉ la plej terurajn aferojn, pri kiuj ŝi aŭdis en la daŭro de la tago.

„Ho, Thor, oni diras, ke la soldatoj certe venos al ĉiuj domoj.“ „Jes, oni diras, sed vi ne senskruple kredu ĉion, kion vi aŭdis.“

„Mi ankaŭ ne kredas ĉion, sed tion diris nia kasi-
stino, kaj ŝi estas tiom maljuna, ke ŝi memoras la la-
stan militon, kaj tiam la soldatoj venis al ĉiuj domoj
en ŝia vilaĝo. Oni devis doni al ili manĝaĵon kaj liton
kaj cetere ĉion, kion ili postulis.“

„Jes, Mona, sed tio okazas nur en vilaĝoj kaj en la
kamparo. En la pli grandaj urboj kaj la ĉirkaŭaĵo ili
prenos nur la kasernojn kaj aliajn domegojn, kie po-
vas loĝi centoj da soldatoj.“

„Thor, vidu,“ kriis Mona subite. „Jen ili venas!!“

Thor prenis la manon de la fratino. „Estu nur tran-
kvila, ili faros nenion kontraŭ ni. Sed tamen estas
eble pli bone, se ni flanken iros, Mona!“ Tion ili faris,
kaj post momento la motorvagonoj tondrante preter-
pasas ilin kun terura bruado. La soldatoj sidas mi-
nacantaj kun la pafiloj enmane. Ŝajnas al Mona kaj
Thor, ke la preterveturado daŭras tuta horo, sed efek-
tive daŭras nur kelkaj minutoj.

Silentaj kaj pensemaj ili ekbiciklas hejmen. Novan
travivaĵon, sed malagrablan ili havis.

11. ĈAPITRO.

En la hejmo de Grann regas febra laboremo. La
milita fantomo ŝvebas super la domo. Meditado kaj
grumblado pri la sekvoj de la okupado ne lasas la
loĝantojn trankvilaj.

La mastrino esploras la kuirejon kaj la manĝo-
provizejon kaj faras longajn listojn pri varoj, kiujn
ŝi bezonas. La mastro aldonas listeton, kiun li plen-
skribis. Sur ĝi staras nur tabako, cigaroj, cigaredoj
kaj tiaj viraj bezonaĵoj.

Kiam li donas la liston al sia edzino, ŝi protestas.
„Tiaj varoj ne estas necesaj por vivi, unue ni havu
nur tiajn varojn, kiujn ni nepre bezonas, kaj poste
ni vidos, ĉu ni povos aĉeti tiajn luksaĵojn.“

„Jes, kompreneble, vi estas prava, kara edzino. Permesu al mi rigardi viajn listojn.“ Sinjoro Grann prenas unu el la listoj kaj komencas legi laŭte: „Kafo, teo, faruno, rizo . . . sapo por la dompurigado, sapo por la persona bezono, haroleo, friziloj — 10, haŭtosmiraĵo 10 ingoj, pudro . . . Ĉu vi kredas, kara edzino, ke ni poste devos manĝi haroleon?“

„Ne, kompreneble ne, kial vi direktas tian malsaĝan demandon al mi?“

„Ĉar vi diris, ke unue ni aĉetu nur varojn necesajn por la vivo, kaj tial mi pensis legante la liston, ke ni pli poste konsumu ĝin.“

„Tagmeze oni en la radio sciigis, ke ni ne rajtas troprovizadi,“ diras Thor kaj ridas.

„Ĝuste tion oni publikis,“ respondas la patrino. „Samtempe oni diris, ke provizo por 14 tagoj ne estas troprovizado, kaj ni ankoraŭ ne mendis tro multe da manĝaĵo.“

„Mi ankaŭ ne volas protesti. Mi ja ne estas polisto, sed kion diros la vendisto?“

„Tion mi scias,“ opiniis sinjoro Grann. Se li ricevos monon anstataŭ varojn, mi estas certa pri tio, ke li diras dankon aldone.“

La pordosonorilo eksonas. Thor, kiu estas plej proksima al la pordo, iras por esplori, kiu kaŭzis tion. La aliaj aŭdas parolon inter li kaj alia viro. Post momento li revenas kun letero en la mano. Li fikse rigardas al Mona kaj diras kun sekreta mieno: „Ĉu vi povas diveni, kiu sendis ĉi tiun leteron?“ La vangoj de Mona iom post iom ekhavas pli ruĝan koloron. „Ĉu ĝi estas por mi? Donu ĝin al mi, Thor!“ Thor tenas la leteron alte, kvazaŭ li provas legi la skribon tra la koverta papero. Fine li donas ĝin al Mona, kiu per tremantaj fingroj malfermas la koverton. Dum kiam

ŝi legas la leteron, feliĉa rideto aperas sur ŝian vizaĝon kaj ŝiaj okuloj brilas.

„Nun venos la princo, kiel mi jam antaŭdiris, ĉu ne?“

„Ne, la princo, pri kiu vi parolas, tute ne scias kien li venos, ĉar li devas esti soldato. Li skribas, ke mi ne skribu al li, ĉar li mem ne scias sian adreson, sed li skribos poste, se estos eble . . .“

12. ĈAPITRO.

Tagoj pasis. La nova stato tre diverse efikis al la loĝantoj de la urbo. Kelkaj tute perdis la kuraĝon pro la fremdaj soldatoj, kaj ili ne kuraĝis iri ekster la domon, sed sidas malantaŭ la fenestroj de mateno ĝis vespero. Aliaj post nur mallonga tempo malgraŭ la ŝanĝoj de la vivkondiĉoj retrovis la ekvilibron. La ŝanĝoj estas multaj, kaj ili tre ĝenas la loĝantojn de la urbo. Antaŭe brilis miloj da lampoj elektraĵ en la stratoj kaj en la butikoj, sed nun estas preskaŭ neeble trovi vojon tra la urbo dumnokte. Nur kelkaj lampoj havas lumon, kaj la lumo estas nur tre malforta. Ĉiuj butikoj estas malhelaj. La urbanoj vivas kiel la koboldoj en la interno de la montetoj. Ĉiun tagon venas novaj ordonoj pri la tago kaj nokto. La lasta ordono temas pri ŝirmo el ligno, ŝtonoj aŭ tero antaŭ fenestroj en la keloj por havi rifuĝejon dum atako de flugmaŝinoj.

Ĉie oni vigle diskutadas pri ĉiuj aranĝoj, kiujn la administracio ordonas. Ankaŭ en vilao „Espero“, la domo de la familio Grann, oni vigle pritraktas la diversajn aferojn.

„Estus pli bone fosi sulkegojn en la parkoj, ĉar en la domoj oni riskas la vivon, se la muroj falos surte-

ren pro eksplodoj," diras Thor, kiam oni iŭn vesperon sidas kune en unu ĉambro.

„Jes, vi certe pravas“, respondas la patro. „Sed kiam estos vintro kaj la sojlo en la termometro falos ĝis 30 gradojn, kaj la sulkegoj estos plenaj de neĝo, mi tamen preferus resti en nia varma ĉambro en la kelo“.

„Ho, patro, mi komprenas. Vi diras kiel iama reĝo: „Mi mortos en mia nesto!“

„Jes, mia filo. Ĉar mi kredas, ke Li, kiu malgraŭ la malbonaĵoj de la homoj, regas la mondon, antaŭe decidis pri ĉio kaj ĉiuj. Se Li decidis, ke mi mortu pro bombo, mi mortos pro ĝi, sed mi ne libervole iros el la domo en malvarma nokto kaj poste mortos pro malsano, kiun certe donos al mi restado dum tiaj ĉirkonstancoj“.

„Ĉu vi vere kredas, patro, ke oni venos ĉi tien por bombadi nian urbon“, demandas Mona.

„Nur Li scias tion, ne mi, kara filino!“

„Mona, kie mi konservu la grandan pupon, se ili venos?“ demandas serioze la malgranda Lisa.

„Viaj pupoj, fratineto, apartenas al la familio, kaj tial vi kunprenu ilin, se ni iam iros en la kelon“.

„Ĉu ankaŭ Fokso apartenas al la familio, Mona?“

„Ne“, respondas Thor. „Fokso devas resti en la supraj ĉambroj, ĝi estas nur besto, kaj laŭ decido de la registaro oni ne rajtas kunpreni bestojn en la rifuĝejon“.

„Ne atentu tion, Lisa, tio ne koncernas nin, sed nur tiujn, kiuj loĝas en grandaj domoj en la urbo. Cetere mi havos ion por diri al vi sekrete. Venu ĉi tien al mi!“ Lisa iris al Mona, kiu duone flustris en ŝian oreilon: „Se, li protestas kontraŭ la ĉeesto de Fokso, vi

nur diru, ke la registaro malpermesis ankaŭ fumadon en la rifuĝejo“.

Lisa jesis feliĉe. Ŝi scias, ke Fokso povos iri kune kun ili en la kelon, ĉar la viroj ne longe povos vivi sen pipo aŭ cigaroj.

13. ĈAPITRO

Estas dimanĉo. La tuta familio estas en la hejmo. Ĉiuj sidas en la ĝardeno. Mona kaj Lisa sidas en la mola herbo sub granda pomarbo, kies densa foliaro ŝirmas ilin kontraŭ la fortaj radioj de la suno. Sinjoro Grann kaj Thor sidas sur benko ĉe la ĝardenatablo. La ĝardenajn meblojn faris Thor, ili estas tre belaj el branĉaj pecoj. Verŝajne la suno ne ĝenas Thor kaj la patron, ĉar ili nek surhavas ĉapelon nek havas iun ajn ombron. Sinjorino Grann preparas la dimanĉan posttagmezan kafon. Thor demandas ĝentile, ĉu li helpu ŝin.

„Ne, dankon“, estas la respondo. „Kiam la kafo estos preta, mi kunprenos ĉion sur la granda pleto“.

„Ŝajnas al mi, ke la tablotuko estas speciale bela, ĉu vi atendas gastojn?“

„Estas ja dimanĉo, Thor, kaj oni ja ne scias“, respondas la patrino kun sekreta mieno.

Ekster la ĝardenatabarilo estas la vojo. Multaj homoj preteriras la ĝardenon. Kelkaj estas konatoj. Ĉiuj rigardas la belan idilion. La konatoj gaje kaj afable salutas la familion. Ankaŭ la najbaroj sidas en la ĝardeno. Ie ludas la radio aŭ gramofono belajn melodiojn, kaj Thor fajfas la saman melodion. Ĉar estas modernaj melodioj, li konas ĉiujn. Sinjorino Grann venas kun la granda pleto en ambaŭ manoj. Sur ĝi estas tasoj, kukoj, kremo, sukero kaj tiel plu; mankas nur la kafo. Subite eksonas fremda, sed tamen konata voĉo de malantaŭ la barilo: „Bonan tagon!“ La voĉo

estas tiu de fraŭlino Riedel, la ĉarma instruistino. Ĉiuj afable salutas: Bonan tagon kaj bonvenon!

La du kuŝantoj, Mona kaj Lisa, ekstaras. Kvankam Lisa ne komprenas la lingvon de fraŭlino Riedel, ili estas bonaj amikoj. Sinjorino Grann venas kun la kafo, kaj ĉiuj eksidas ĉirkaŭ la ronda tablo. Gaje kaj vigle ĉiuj per tradukado de la gejunoloj interparolas, dum kiam ili trinkas la kafon.

„Sajnas al mi, ke viaj vangoj estas pli ruĝaj ol kuinte, Thor“, diras Mona kun moketa rideto.

Thor ne respondas, sed fraŭlino Riedel estas lia helpanto. „Tio certe estas pro la forta suno, Mona. Vi ja ne povis ricevi ruĝajn vangojn, ĉar vi prenis sidlokon sub granda ombrelo. Rigardu, ankaŭ mi certe havas ruĝajn vangojn, ĉar mi iom malfrue ekiris de la hejmo kaj tial devis urĝi“.

„Jes, mi komprenas, vi ambaŭ havas ruĝajn vangojn pro la sama kaŭzo“!

„Ho, fraŭlino Riedel“, diras Thor, „bedaŭrinde, ke vi ne vidis la vangojn de Mona hieraŭ matene, kiam la poŝtisto alvenis“.

„Kio do okazis. Mi estas tute scivola pri tio“.

„Mona ricevis leteron de la princo“!

„Ĉu vere, mi gratulas vin. Ĉu li skribis longan leteron?“

„Ne“, grumblis Mona, li skribas, ke li estos soldato, kaj ke li scias nenion pli, sed li esperas . . .“

„Hodiaŭ ĉiuj homoj esperas, sed la espero de la diversaj homoj ne havas la saman celon, bedaŭrinde ne. Se la tuta homaro esperus, ke paco regus la mondon, neniam venus la milito“!

14. ĈAPITRO

La vespero venis. Miloj da steloj estas sur la mal-

hela nokta ĉielo. La vetero estas raviga. La naturo silentas, kaj ĉiuj, kiuj estas en la libera naturo, estas sindonaj, kva·zaŭ ili estus en preĝejo. Ie bojas hundo. Tre malforta kvakado de la herbejoj estas aŭdebla.

Thor kaj fraŭlino Riedel iras kune sur la vojo. Li akompanas ŝin al ŝia hejmo. Silentaj ili iras flankon ĉe flanko. Thor volonte dirus ion, se ne mankus al li vortoj. La temon pri la vetero li tro ofte aplikis, kaj — li scias, kion li ŝatus diri al ŝi, se li nur kuraĝus, sed ŝajnas al li, ke ŝi estas tiel bela kaj ĉarma, kaj li mem havas neniujn speciale bonajn kvalitojn.

Fraŭlino Riedel rompas la silenton: „Ĉu vi lasis la buŝon en la hejmo, Thor?“

„Ne, fraŭlino“.

„Ĉu vi deziras resti inter la „Jes“ kaj „Ne“ Esperantistoj?“

„Ne, fraŭlino instruistino“.

Ĉar estas dimanĉo, mi hodiaŭ ne estas instruistino, mi ankaŭ ne estas fraŭlino, sed nur simple Ida. Cetere, kial vi ne prenas mian brakon, ĉu vi ne proponis vin kiel mian gardanton?“

„Jes, fraŭ . . . Ida“, balbutas Thor ĝeneme kaj prenas ŝian brakon.

„Hieraŭ mi aŭdis, ke fremdaj soldatoj ĝenis virinojn kaj sekvis ilin ĝis la pordo. Se ni brakon en brako iros, ili certe kredos, ke ni estas gefianĉoj kaj lasos nin iri“.

Thor ne scias kial, sed eble estas la malforta premo de ŝia brako, kiu donas al li kuraĝon por libere paroli al ŝi, kvankam lia koro batas kiel post rapida kurado.

„Ankaŭ mi aŭdis pri tiaj aferoj, kaj mi scias, ke ne estas fabelaj rakontoj, sed vero, ĉar unu el la viktimoj estas fraŭlino, kiu laboras en la sama kontoro kiel mi“.

„Jes, kiel vi vidas, estas necese, ke vi gardos min“.

„Tion mi ankaŭ faros; neniuj tuŝu vin, kiam mi ĉeestos“, diras Thor fervore.

Malpeze kaj entakte la gejunuloj iras sur trotuaroj laŭlonge de belaj vilaoj kun bonodoraj floroj en la ĝardenoj.

La pensoj de Thor flugas per malpezajflugiloj, neniam li kuraĝis esperi pri tia granda feliĉo.

„Ĉu vi pripensis, ke ankaŭ aliajn ni povus renkonti sur la vojo hodiaŭ vespere dum tia bela vetero“, li demandis.

„Aliajn! Ne, kial?“

„Ni povus ekzemple renkonti konatojn, kaj eble ankaŭ ili pensus, ke ni estas gefianĉoj“.

„Ĉu vi timas tion, Thor?“ ŝi respondas, kaj ŝajnis al li, ke estis varmo en ŝia rigardo.

„Ne, Ida, mi timas nenion momente“.

Ĉe la pordo ŝi dankis lin pro la afabla akompano kaj la ĉarma kunirado. Kiam li forta pro feliĉo premis ŝian manon, ŝi kun ĉarma rideto, kiu tre konfuzigis lin, diris: „Ĉu vi ne forgesas, ke mi estas nur malforta virino, kiu ne povas elteni tian fortegan premon. Vi nur gardu min! Ne frakasu min!“ Ili „ĝisrevidis“, kaj Thor ekiris hejmen. La hejmenirado longe daŭris. Li iris sola kun siaj pensoj kaj espero sub la brilantaj steloj, kaj la juna varmega sango iris al la kapo.

Se li estus vidanta la ĉarman knabinon ĉe sia fenestro rigardi la samajn stelojn kiel li kun ĉarma rideto en siaj belaj okuloj enspirantan la bonorodon de la ĝardeno, dum kiam ĝemeto de sopiro eliras el ŝia buŝo, li estus ebrie feliĉa.

15. ĈAPITRO

En vilao „Espero“ ĉio estas trankvila. Tamen ne

ĉiuj ankoraŭ enlitiĝis. Mona sidas en sia ĉambreto. Ŝi estas sola kun siaj revoj kaj sopiroj. En la duonmallumo ŝi ekvidetas la foton de la amiko, ŝia princo, kiel diras Thor. Jes, li vere fariĝis ŝia princo, kaj eble li iam fariĝos reĝo. Kvankam ŝi konas lin nur laŭ tiu foto kaj la leteroj, kiujn li sendis, ŝi sentas, ke li estas bona homo. Tion ŝi supozas per aŭ eble inter la linioj en la leteroj, sed ŝi ankaŭ legas tion en liaj okuloj.

Mona iras al la fenestro kaj malfermas ĝin. Ĉarmaodoro enpenetras tra ĝi. La aero estas plena deodoro kaj sopiroj. Siluetoj de arboj en malproksimaj ĝardenoj bele desegniĝas sur la okcidenta parto de la sennuba somerĉielo. Milo da steloj brilas sur ĝi. Mona enpense rigardas la stelojn. „Ĉu ankaŭ li de ie ajn loko rigardas la stelojn. Eble li postenas kun pafilo en la mano, kiel ŝi vidis la fremdulojn fari ĉi tie. Ho, kiel stranga estas la mondo. Jen ŝi staras kaj sopiras al li, kaj li, li certe faras la samon al ŝi. Du korojn disigas nur kelkaj mejloj; kion signifas distanco por koroj amantaj, sed nun venis la milito. Kial? Kiu deziras batali anstataŭ ami? Certe ne li, kun la bonkoraj okuloj. Li certe preferus stari kun floroj en la mano anstataŭ kun pafilo. Jen ŝi vidas belan stelon; tre alte ĝi estas sur la ĉielo kaj kiel serene ĝi brilas. Ĝin ŝi petos sciigi lin pri siaj espero kaj sopiro. La lumo de la stelo estas tre klara. Ĝi estas fidela stelo — kiel li. Subite ŝajnas al ŝi, ke la stelo ekfalas teren. Profunda tremo eliras el ŝia koro. La espero paliĝis. Sed en la sama momento varmega sento de ĝojo trairas ŝian bruston. La stelo ne perfidis ŝin, ĝi ne mortis, sed ĝi portos al li ŝiajn pensojn kaj sopirojn.

Paŝoj en la gruso de la trotuaro rompas ŝiajn pensojn. La paŝoj estas malpezaj, sed firmaj kiel de homo sen malfacilaĵoj. Ŝi ekvidas malluman ombron, kiam

la iranto atingas la angulon de ilia ĝardeno, kaj nun ŝi ekkomprenas, ke estas Thor. Li haltas ĉe la enirejo. Silenta li staras kiel por enspiri la ĉarman atmosferon de la bela vespero. Fine li eniras la ĝardenon, fermas la pordeton kaj iras al la domo. Kiam li venas pli proksimen, Mona mallaŭte fajfetas. Thor rigardas supren, kaj li ekvidas ŝin. „Kion vi faras, Mona?“

„Mi ĝuas la belegan veteron. Cetere mi tre ŝatus iri por iomete promeni en la belan naturon. Ĉu vi kuniros?“

„Mi? Mi ĵus iris longan vojon!“

„Jes, kompreneble, se vi estas laca, mi ne postulas“, diras Mona kun bedaŭro. „Sed mi ne povus dormi, se mi irus en la liton nun, tial mi pensis, ke eble . . .“

„Ne, mi ankaŭ ne“, estas la respondo. „Venu nur, mi estas preta“.

Post kelkaj sekundoj Mona estas preta, kaj per singardaj paŝoj por ne vekti la aliajn ŝi rapidas malsupren al la frato.

Flankon ĉe flanko la gefratoj iradas en la bela noktito inter ĉarmaj dometoj, kies anoj ripozas en la noktaj kuŝejoj.

Ili forgesis ĉiujn incitetojn kaj gefratajn malakordojn. Nun ili konfidas unu al ilia, kaj ambaŭ malsekrete rakontas la esperon kaj la sopirojn pri la estonto kaj promesas helpi sin reciproke, se estos necese.

16. ĈAPITRO

Iun tagon Mona venis hejmen de la kontoro vespere je la ordinara tempo. Ŝi estas tre ekscitita. La patrino tuj vidas, ke io okazis kaj demandas ŝin: „Kio estas?“

„Mi neniam plu sola iros al aŭ el la urbo“, respondas Mona. Ŝia voĉo tremas kaj larmoj aperas en la okulanguloj.

„Sed kara infano, ĉu okazis al vi akcidento survoje de la kontoro?

Mona mordas la lipon por ne plori kaj balbutas: „Ne!“

„Nu, kara infano, sidigu vin kaj trankviliĝu, poste vi povos rakonti al mi, kio okazis al vi.“

Mona eksidis, kaj la patrino pacience atendis, ĝis kiam ŝi mem komencis paroli.

„Fremdaj soldatoj ĝenis min en la urbo!“

„Ĉu vere? Dum la tago? Ĉu ne estis homoj sur la strato?“

„Jes, eĉ tre multaj, sed neniuj kuraĝis helpi min.“

„Kion faris la soldatoj?“

„Unue ili demandis pri la ĝusta vojo al iu loko, kaj ĉar mi ne riskis insulti ilin, mi rakontis al ili, kien ili iru. Unu el ili diris: „Dankon, ĉarma fraŭlino, eble ni povos kune iri, ĉar vi verŝajne iros la saman vojon laŭ la direkto de via biciklo“.

„Ne, mi ĉiam iras sola,“ respondis mi kaj volis ekveturi, sed li metis sian manon sur la biciklon, tiel ke mi ne povis bicikli. Mi diris al li, ke li lasu min, sed li nur ridis kaj ne liberigis min. Mi komencis piediri, kaj li sekvis min. Kiam ni venis al angulo, mi ekvidis policiston. Mi iris al li tirante la biciklon, sed li diris nur, ke li bedaŭras, la fremdajn soldatojn li ne rajtas ordoni. Dum mi klarigis tion al li, amaso da homoj kolektiĝis ĉirkaŭ ni. Mi tre hontis pro la situacio kaj estis preskaŭ ekploronta pro honto. En la sama momento alvenis fremda sinjoro. Li estis tre granda kaj kondutis kiel homo, kiu scias obeigi subulojn. Li demandis iun, kio estas, kaj post kiam li eksciis tion, li turnis sin al mi kaj diris: „Momenton, fraŭlino, mi parolos kun la soldato, vi povos libere daŭrigi vian vojon“. Pro timo kaj ekscitiĝo mi tute forgesis danki

lin. Mi rapide forveturis. Sed miaj kruroj tremas ankoraŭ!”

„Nur trakviliĝu, Mona. La soldato certe estis ebria, se ne, li ne kondukis tiel dum la tago, kiam multaj homoj estas surstrate.“

„Ne, li tute ne estis ebria, li ne iris ŝanceliĝe kaj ne malbonodoris.“

„Nu, jes, povas ja esti, ke li estas neordinara homo rilate al virinoj. Tiaj homoj ankaŭ troviĝas ĉi tie. Sed tial la certeraj ja ne estas tiaj homoj.“

„Eble vi kredas tion, patrino, sed ne mi. Laŭdire okazis jam kelkfoje tiaj aferoj, kaj mi ne pli ofte riskos ion tian.“

„Kial Thor ne akompanis vin, kiel li kutimas, Mona?“

„Ĉar li havis ion por fari en la urbo, kaj mi ne ŝatis atendi lin. Li ofte bezonas longan tempon.“

17. ĈAPITRO

Denove vesperiĝis. La familio Grann sidiĝis en la ĉambro malantaŭ la malheligitaj fenestroj. Ili pritraktas aferojn okazintajn dum tiu tago. Ankaŭ pri la malagrabla aventuro de Mona oni interparolas. Mona estas iom ekcilita, ŝi ankoraŭ ne trankviliĝis. La sinjoroj kaŝe ridetas, ili rigardas la aferon pli bagatele. Thor bone scias, ke estas vero, ĉar li mem vidis, ke tiaj aferoj okazis, sed ne plaĉas al li, ke la fratino malkuraĝu, tiel, ke ŝi ne sola povos iri hejmen. Li ofte havas komisionojn en la urbo post la labortempo, kaj se li estonte estos devigata akompani ŝin ĉiun tagon, li ja neniam plu havos okazon prizorgi siajn proprajn aferojn.

Mona ekvidas, ke Thor ne serioze pritraktas la aferon. Ŝi furioziĝas kaj preskaŭ eksplorante ŝi elkrie-

tas: „Se vi ne akompanos min, mi ne iros en la urbon morgaŭ!“

„Nur trankviliĝu, infano mia,“ petas la patrino. Kompreneble li akompanos vin.“

„Jes, sed ne nur morgaŭ matene, ankaŭ posttagmeze. Se ne, mi restos hejme!“

„Mi ja ne estas vartistino, sed tamen mi akompanos vin, se estos necese, fratineto.“

„Jen vi mem povas konstati. Li volas, se estos necese. Mi ne kredas lin. Se li havos ion por fari en urbo, mi mem povos iri.“

„Silentu ĉiuj kaj aŭskultu,“ subite interrompas la patro.

Ĉiuj silentas, kaj tra la aero venas al iliaj oreloj stranga sono. La virinoj paliĝas kaj la knabineto ekploras. Eĉ la viroj dum momento pro la nenormala situacio ne moviĝas. Thor rompas la premigan atmosferon kriante: „Jen alarmo pro venonta flugmaŝinatako, ni ĉiuj iru en la kelon“.

Teruran ĥaoson rezultigas lia elkrio. Lisa laute ploras, la virinoj eksaltas de sur la seĝo sed ne scias kion fari. Sinjoro Grann trankviligas ilin per sia konduto: „Nur trankvile iru al viaj ĉambroj kaj kunprenu la necesajn vestojn por restado en malvarmeta kelo. Kunprenu ankaŭ librojn aŭ manlaborojn, eble ni sidu tie dum longa tempo.“ Post kelkaj minutoj ĉiuj sidiĝas en la tiel nomata rifuĝejo, antaŭ kies fenestroj estas metitaj dikaj traboj, tiom dikaj, ke pecoj de eksplodantaj bomboj ne povos trabori ilin. La virinoj kunhavas manlaborojn kaj la viroj librojn kaj gazetojn. Lisa ne forgesis siajn karajn pupojn.

La tempo pasas, sed estas tre malfacile sin okupi pri iu ajn laboro. Ĉiun momenton iu ekaŭdas strangan

sonon, kaj ĉiuj devas atente aŭskulti por konstati, ĉu vere estas io neordinara.

„Jen, aŭdu,“ krietas Mona ekscitita, „venas flugmaŝino!“

„He, He,“ ridegas Thor, „vi havas longajn orelojn, sed ili ne estas bonaj. Estas nur aŭto. Cetere vi nur rigardu Fokso-n, kiel trankvila ĝi kuŝas sur la planko. Tiom longe kiom ĝi kuŝas senmove, nenio akazis.“ En la sama momento Fokso levas la kapon kaj atente aŭskultante ĝi ekmurmuras. Thor metas manon sur la hundon por silentigi ĝin, kaj nun ĉiuj povas aŭdi la tondron de flugmaŝinoj. Tremante ili rigardas unu la alian per timemaj rigardoj. Jen la nuda realeco de teruro ŝvebas super iliaj kapoj. Plej terura ĝi estas, ĉar ili ne scias, kie ĝi estas ne havante eblecon vidi la flugmaŝinojn.

18. ĈAPITRO

Maŝinoj venis, kaj maŝinoj forflugis. Intertempe la grupeto en la kelo de'l „Espero“ parte retransviligis, sed forta premo de timo kaj necerteco tamen regas en iliaj animoj. La virinoj kelkfoje provis eklabori, sed ili nur malbone sukcesis. Sinjoro Grann ŝajnas legi gazeton. Lia rigardo sekvas la liniojn sur la papero, tamen la cerbo laboras pri aliaj aferoj. Se oni demandus lin pri la enhavo de la artikolo, li certe ŝuldu respondon. Li eble estas la sola en la ĉambro, kiu vere scias pri la serioza situacio, en kiu ili troviĝas. Li scias, ke en la venonta momento ili ĉiuj povos esti mortigataj aŭ invalidigataj; kaj la domo, ilia kara hejmo ĝis nun, kaj la rifuĝejo kontraŭ ĉiuj malbonaĵoj povos esti frakasataj kaj bruligataj. Feliĉe la aliaj ankoraŭ ne plene konceptas ĉion.

Kaŝe li rigardas la vizaĝojn de la gekaruloj. Ĉiuj sidas silentaj kun gravaj mienoj, eĉ en la vizaĝo

de la knabineto respekuliĝas la seriozo de la tempo. Dum longa tempo nenia sono de ekstere rompas la tankvilon en la ĉambro. Jam espereto ekkreskiĝas en la premitaj koroj: „Kiom da tempo ni jam sidas tie ĉi?“ demandas Thor, dum kiam li larĝe oscedas, certe ne pro manko de dormo, ĉar lin ne ĝenas, ke li ankoraŭ ne povis eniri la liton, sed eble pro manko de la kutima loko kaj laboro.

„Unu horon kaj dek minutojn,“ respondas Mona, kiu havas sian horloĝon sur la brako. „Mi rigardis mian horloĝon, kiam mi eniris la ĉambron.“

„Jes, vi pravas,“ diras la patro. „La sireno eksonis kelkajn minutojn antaŭ la naŭa.“

„Ĝis kiam ni restu ĉi tie?“ demandas Mona.

„Ĝis kiam? Kompreneble ĝis kiam la sireno denove eksonos por sciigi al ni, ke la maŝinoj estos for kaj nenia danĝero minacas nin.“

„Eble ni povos aŭdi, ĉu la maŝinoj iros hejmen. Kaj kiam estos pasinta sufiĉe da tempo post la foriro de la lasta maŝino, ni sen ia danĝero povos ree iri supren,“ opinias la patro.

„Tiukaze estos necese, ke ni ricevos signon de la piloto, ĉar ni ja ne scios, kiam la lasta maŝino venos,“ diras Thor fripone.

„Ne tute ekzakte, sed tamen, ĉar ili sekvas unu la alian en grupoj, kaj eĉ inter la grupoj ne estas longa distanco,“ respondas la patro.

„Eble vi pravas, patro,“ daŭrigas Thor, sed nun pasis minimume duona horo post kiam la lasta maŝino tondris super niaj ĉapoj, kaj ŝajnas al mi, ke ĝuste nun mi povas ekaŭdi la malproksiman bruadon de maŝino. Eble estas malfruiĝinto!“

Sinjoro Grann estis malfermonta la buŝon por iel respondi al la vortoj de Thor, sed en ĉi tiu momento

aŭdiĝas terura bruado de motoro tiel proksime, ke ŝajnas al ili, ke ĝi devas esti nur kelkajn metrojn super iliaj kapoj... kaj subite fajfanta sono trapenetras la murojn. La sono estas tiom akra kaj terura, ke ili neniam aŭdis ion similan. La lango de sinjoro Grann paraliziĝas, kaj la premo estas tiel forta, ke neniuj povas eligi sonon el sia buŝo.

En la posta sekundo okazas io nepriskribebla al la loĝantoj de l' „Espero“. Bombo falas teren ie, kaj tiel proksime, ke ŝajnas al ili, ke la tuta domo leviĝas kelkajn futojn kaj refalas, dum kiam miloj da ŝtonoj kaj tegoloj estas frakasataj. La elektra lumo malaperas kaj la ĝismorte timigitaj virinoj kriegas, kaj infana ploro aŭdiĝas. Thor ne perdis la ekvilibron: „Trankviliĝu kaj ne krii, mi tuj lumigas la ĉambron, por ke ni vidu, ĉu ni ĉiuj estas vivaj“.

19. ĈAPITRO

Thor rapide trovis sian poŝlumigilon. Li eklumigis la ĉambron kaj la palajn vizaĝojn. Lisa sin premis al la fratino, kaj timo vidiĝis en ŝiaj grandaj okuloj. „Nu,“ diris Thor provante montri senzorgecon: „Ĉiuj estas savitaj. Se vi kuraĝas sidi kelkajn minutojn en mallumo, mi esploros la eksteron.“

„Ĉu ne estos tro danĝere eliri,“ diris la patro. „La sireno ankoraŭ ne sonis.“

„Nenia danĝero plu minacas, mi kredas. Se venos pluraj maŝinoj, mi kompreneble rapide revenos.“ Thor iris eksteren. La ceteraj apenaŭ kuraĝis spiradi por ne riski, ke ili ne aŭdu eventulan bruadon de io ajn. Minutoj pasas, sed ŝajnas al ili, ke jam horoj pasis. Ŝajnas ankaŭ al ili, ke ili kelfoje aŭdis voĉojn de l' ekstere.

Fine revenis Thor, kaj la demandoj flugis are al li.

„Ne multon mi scias, sed vi trankvile povos iri supren, la sirenoj jam anoncis nedanĝeron antaŭ kelkaj minutoj.“

„Ĉu estas vero?“ diris la patro dube. „Ni sidis tute silentaj, kaj tamen ni nenion aŭdis.“

„Ne, tio ne estas stranga, ĉar la plej proksima sireno diris nenion. Pro la falo de la bombo ĝi certe detruigis.“

„Kiel vi povas scii tion, filo?“

„Mi aŭdis tion. La stratoj estas jam plenaj de homoj, kiuj scivoleme esploras la ĉirkaŭaĵon. Cetere vi nun iros supren, ĉu ne? Mi montros al vi ia vojon per mia lumigilo, kaj post tio mi ŝatus ankaŭ iomete rigardi la eksteraĵon!“

„Povos esti danĝere, Thor,“ diras la patrino zorgeme. Lasu tion ĝis morgaŭ matene, estos pli bone, kiam ne estos mallumo.“

„Tio ne gravas, se aliaj povas trovi ion, mi ankaŭ,“ respondis la vigla junulo. „Ĉu vi ne kuniros, Mona?“

„Ne, dankon, mi ne kuraĝas, Thor.“

„Sed mi kuraĝas,“ sciigis Sinjoro Grann. Tuj la virinoj protestis: „Ĉu vi ambaŭ iros kaj lasos nin solaj, tio estas nekorekta!“

„Babilaĉo,“ murmuris Grann. „Nenio kaj neniu minacos vin. Cetere ni tuj revenos. La bombo certe falis tre proksime.“

Ĉiuj iris supren, kaj la virinoj sidiĝis en unu ĉambro. Thor kaj la patro surprenis surtuton kaj eliris.

Multaj homoj vagadis tra la stratoj. De la interparolado ili baldaŭ divenis, kien ili iru. En la nokta duona mallumo tio ŝajnis granda ludo, en kiu ankaŭ ili estas aktoroj. Fine ili atingis la scenejon. Amaso da homoj staras en grupetoj. Strangaj homoj en nekonvenaj vestoj. Flustrante oni metas kapon al kapo:

„Jen vidu, tie mankas granda arbo. Jes, kaj tiu domo, vidu ĝin. Fenestroj ne estas en ĝi, kaj for estas ankaŭ la tegmento. Ĉu la homoj? Neniu scias la respondon.

Subite alvenas policista aŭto. Ŝvarmo da policistoj elrampis el ĝi kaj komencis forpeli la scivolemulojn kriante: „Estos danĝere resti ĉi tie. Kelkaj bomboj kuŝas ĉi tie ankoraŭ ne eksploditaj“.

Panike la grupoj disiĝis, kaj timigitaj homoj forkuris ĉiudirekten. Ankaŭ Thor kaj lia patro urĝis al la hejmo.

20. ĈAPITRO

Kiam tagiĝis, oni esploris kaj ekzamenis la eksteron. Evidentiĝis, ke al kelkaj fenestroj en „Espero“ mankas la vitro. Tio tamen nur estas bagatelaĵoj kompare kun la difektoj, kiujn ekhavis domoj kuŝantaj pli proksime al la eksplodejo.

Tagmeze ĉiuj anoj de la domo denove ĉeestas en la manĝoĉambro post neordinara ekscitita intertempo. Thor kaj Mona jam spertis multon pri la nokta tragedio. Apenaŭ oni sidiĝis ĉe la tablo, antaŭ ol ili komencis preskaŭ samtempe sciigi al la ceteraj pri siaj spertoj. „Mi aŭdis,“ komencis Mona kaj faris necesan paŭzon en la manĝado, „ke minimume 20 personoj estis vundataj, kaj ili estas veturigitaj al la hospitalo“. „Jes, kaj...“ Thor malpacience ekparolas per buŝo plena de manĝaĵo — „unu el la bomboj falis nur du metrojn malantaŭ domo, kies anoj sidis en ĉambro en la kontraŭa flanko de la domo“.

„Jes, tion ankaŭ mi aŭdis. Kaj en tiu domo estis morte vundita infano, kiu kuŝis en la lulilo.“

„Ne, tio ne estas vero,“ ripostis Thor. „Mi parolis kun unu el la policistoj, kaj li diris, ke la patrino nur hazarde evitis la morton. La infaneto en la lulilo

ekploris, kaj la patrino klinis sin super la lulilon por konsoli ĝin; en la sama momento falis kaj eksplodis la bombo antaŭ la domo, kaj unu el la pecetoj de la bombo trafis la muron kaj traboris ĝin kelkajn centimetrojn super la kapo de la kliniĝanta patrino. Cetere morgaŭ ni ĉiuj devos resti hejme.“

„Kial?“ demandas la patrino.

„Ĉar neniu ricevos permeson pasi la vojon al la urbo sen speciala permespapero, kaj hodiaŭ ni ne povos havigi al ni tion.“

„Vi kredas eble, ke vi povos libertagon ekhavi morgaŭ pro tio,“ ridis la patro. „Kompreneble ĉiuj, kiuj havas laboron aliloke, ricevos permeson iri tien, kie la laborejo estas.“

„Jes, se ili havas la paperon.“

„Kaj kie ni ricevos tian gravan paperon?“ demandas la patro kun duba mieno.

„Ĉe la loka policisto,“ sciigas Thor.

„Nu, ni vidos,“ diras la patro, prenas la telefonon kaj petas la numeron de la policejo: „Halo! Jes. Halo! Vi parolas kun Grann, vilaĝo „Espero“. Iu asertis, ke oni bezonos specialan permeson por iri al urbo, kaj mi diris al li, ke ĉiuj, kiuj havas laboron por prizorgi tie, verŝajne ankaŭ povos tien iri, ĉu mi ne pravas? Halo! Kion vi diras? Ĉu oni nepre devos havi specialan paperon? Jes, mi komprenas. Ĝi estos havebla ĉe vi morgaŭ laŭvice. Dankon. Ĝis!“ Sinjoro Grann metas la ilon sur la gafon pli forte ol necese.

„Eble ankaŭ vi havos libertagon morgaŭ,“ triumfis Thor.

„Sensencaĵo,“ murmuris la patro. „Kial tiaj ĝenoj kontraŭ senkulpaj urbanoj!“

21. ĈAPITRO

Tagoj ree pasis. La malfacilaĵojn pro la barado oni

jam forgesis, sed tamen ne la sekvojn de la bomboj. Oni kompatas la viktimojn. Evidentiĝis, ke neniu estis danĝere vundita, sed multaj devis translokoĝi, ĉar iliaj hejmoj ne estis loĝeblaj.

Kiam la familio sidis ĉe la vespermanĝo, Thor rakontis, ke venis nova aro da soldatoj al la urbo. Oni diris, ke alvenos dudekmil soldatoj en la venonta semajno.

„Dudekmil soldatoj!“ diras sinjoro Grann. Pri tio mi vere dubas. Al tiom da homoj ni ne havas lokon en nia urbo, mi kredas.“

„Kompreneble ni havas lokon por ili,“ opinias Thor.

„Ĉu? Mi volonte scius, kie ili estus lokataj. En la kazernoj estas loko por nur maksimume du mil.“

„Jes, vi certe pravas, patro. Sed ekzistas ja ankaŭ aliaj eblecoj.“

„Kiuj? La hoteloj kaj gastejoj jam estas plenplenaj.“

„Vi denove pravas. Sed ni havas ankoraŭ multajn grandajn salonojn, kaj cetere ni ja ankaŭ havas lernejojn.“

„Lernejojn? Kien do iru la infanoj, se oni prenos la lernejojn?“

„Mi ne scias, patro. Ŝajne ili restu hejme kaj havu ferion. La gelernantoj certe ne plendos, ankaŭ ne la geinstruistoj, ili ja tamen ricevos sian salajron.“

„La lernejojn ili ne rajtas preni,“ kolerete diras Mona. „Tion diris advokato Melin en nia kontoro hieraŭ.“

„Ili ne rajtas,“ ripetas Thor moke. „Ĉu vi vere kredas, ke ili demandas pri rajto aŭ leĝo. Milito estas milito, kaj dum milito valoras nur unu rajto, la rajto de la pli forta kaj pli potenca. Dum milito la rajto sidas en la pafilo.“

„Vi kredas ŝajne, ke vi estas sperta pri tiaj aferoj, Thor. La advokato klarigis al nia kontrorestro pri la leĝoj faritaj antaŭ la milito pri rajtoj dum milito, kaj laŭ tiu leĝo ili rajtas nek preni komunumajn nek ŝtatajn domojn.“

„Kaj vi certe naive kredas, ke ili respektas tiajn leĝojn,“ rikanis Thor.

„Nun, karuloj, kial diskuti tion? Lasu tiajn aferojn al tiuj, kiuj tamen siatempe decidos pri ili,“ milde diris sinjorino Grann. „Vi ja ne frekventos lernejon plu kaj Lisa nur komencos post du monatoj. Do eĉ se ili prenos ĉiujn lernejojn, tio ne koncernas nin.“

La telefono eksonas. Thor kaj Mona eksaltas por preni la aŭdilon. Ili samtempe atingas ĝin. „Estas certe al mi,“ diras Mona tenante la aŭdilon en la mano, sed ne povante levi ĝin, ĉar Thor metas sian manon sur ĝin.

„Se estas al vi, mi tuj donos ĝin al vi.“ La pli forta fine venkas, aŭ eble la pli saĝa cedas.

„Halo. Jes estas ĉe Grann, estas Thor. Ho. bonan tagon, fraŭlino Riedel. Dankon, tre bone — kaj vi? Kion? Neniu kurso morgaŭ vespere. Kial? La lernejo estas okupita por alia celo. Mi komprenas. Bedaŭrinda afero, sed ni povos nenion fari. Jes, dankon, mi salutos ĉiujn. Halo! Momenton mi petas!“ Thor metis la aŭdilon kaj demandis, ĉu li invitu fraŭlinon Riedel veni morgaŭ vespere. Ĉiuj tuj konsentas.

„Halo! Pardonu, ke vi tiom longe devis atendi. La tuta familio postulis, ke mi invitu vin veni morgaŭ vespere. Vi akceptos. Bone. Do ĝis revido.“

„Kial venis tiom da soldatoj ĉi tien?“ plendas Mona.

„Kaj kial la homoj entute tiel frenezigiĝis, ke ili komencis militi?“ ridis Thor.

Nenien ni povas iri senĝene por tiuj impertinentaj

ebriuloj. Nenie estas trankvilo kaj paco," daŭrigis Mona malgaje.

„La mondo rapide ŝangiĝis. Antaŭ kelkaj tagoj vi malkontentis pri ĝi kaj diris, ke „okazas nenio.“ Hodiaŭ vi verŝajne jam kontentiĝis, sed nun ekrulis la bulo, kaj li, kiu ĝin ekruligis, ne kapablas ĝin haltigi.“

22. ĈAPITRO

La postan tagon Thor vespere venis hejmen ĝaje kaj vigle fajfante. Li bruetadis, kiam li metis sian biciklon en la kelon, kaj fajfante modernan melodion li supreniris la ŝtuparon per du saltoj kaj falis preskaŭ kun la pordo en la ĉambron.

„Ĉu vi gajnis la premion en la lotado?“ mokis Mona.

„Preskaŭ,“ estis la indiferenta respondo.

„Ne, nun mi scias, kial,“ ridetas Mona. Hodiaŭ vespere ŝi ja venos,“ ŝi ridas moke.

„Kompreneble, fratineto. Ĉu vi envias min? Cetere mi hodiaŭ parolis kun soldato en la urbo.“

„Ĉu vi parolis kun unu el la fremduloj, aŭ ĉu estis unu el niaj propraj soldatoj?“

„Kompreneble unu el la fremduloj, kiel vi diras tiel maldolĉe. Li estas samideano.

„Tio signifas nenion. Li estas malamiko de ni. Mi ne komprenas, ke vi ne hontas!“

„Tute ne. Laŭ via opinio, mi certe faris ankoraŭ pli grandan pekon.“

„Kiel?“ estas la senpacienca respondo de Mona.

„Ĉar mi invitis lin ĉi tien.“

„Vi estas freneza. Mi certe forkuros, se li venos.“

„Tio ne gravas. Vi certe revenos. kiam vi malsatos,“ rikanas Thor senkomplete.

Mona jam estis formonta akran respondon, kiam iu frapis la pordon. Ekirante al la pordo por ĝin mal-

fermi, ŝi abrupte turniĝis kaj kun timego en la voĉo diris: „Mi ne malfermos la pordon. Povus esti li“.

„Stultulo,“ diris Thor kaj kuris al la pordo. Li jam divenis, kiu estas antaŭ ĝi. Mona malfermis la alian pordon por ne riski ion, sed apenaŭ la antaŭpordo estis malfermita, antaŭ ol ŝi restis gaje staranta.

„Bonan tagon, karaj geamikoj, kaj dankon pro la invito,“ sonis la konata voĉo de fraŭlino Riedel. „Ŝajnas al mi, ke vi forte kaj iom akre pritraktis iun ajn aferojn. Espereble ne temis pri mi. Mi tre malĝojos, se mi povus tion kaŭzi.“

„Ne, fraŭlino,“ certigis Thor rapide.

„Ĉu mi ankoraŭ estas fraŭlino? Ŝajnas al mi, ke ni antaŭ kelkaj tagoj interkonsentis pri tio, ke ni formetu la titolojn.“

„Pardonu,“ ridetis Thor. „Mi volonte plenumos mian promeson.“

„Bone. Kaj ĉu vi havas ion por diri?“

„Jes, mi jam estis diranta, ke nian malgrandan diskutadon mi kulpis. En la urbo mi renkontis fremdan esperantiston kaj ĝoje mi invitis lin viziti nin. Tio tre incitis mian karan fratinon.“

„Kial? Tio ne estas ebla.“

„Jes, estas eble,“ diras Mona ĉagrenita. „Li estas soldato, kaj mi malamas ĉiujn fremdajn soldatojn!“

„Ke li estas soldato, estas bedaŭrinda afero por li, amikino, sed la vestoj ja ne gravas. Eble li havas oran koron, kaj pli grave estas, ke li estas esperantisto. Ni do devas konsideri lin kiel amikon.“

„Ĝuste tion mi diris,“ fieris Thor. „Jen venu en la ĉambron, aŭ ĉu ni restu en la koridoro dum la tuta vespero.“

„Tion decidu la gastigantoj,“ ridetis fraŭlino

Riedel, prenis la brakon de Mona, kiu iom malgaje iris kun ŝi en la ĉambron.

Gesinjoroj Grann afable salutis la gaston, kaj baldaŭ la nigraj nubetoj de malbonhumoro malaperis pro la afabla atmosfero. „Jen vi do estas senlaborulino pro certa kaŭzo,” ŝercas Thor.

„Jes, vi pravas. Eble mi devos iri al la subvencia kaso por peti helpon.“

„Vi certe ankaŭ estos helpata, neniŭ havas koron por tion rifuĝi,” opinias Mona.

„Eble oni tamen diros al vi, ke vi serĉu alian laboron,” ridas Thor.

„Ĉu vere. Tion mi ne esperas, ĉar mi vere ne taŭgas por alia laboro. Mi frekventis lernejon de mia sepa jaro ĝis mia dekokajaro.“

„Ĉu vi neniam havis okupon ekster via patra hejmo,” demandas Mona.

„Ne, tion mi ne havis.“

„Jen rigardu, patrino. Vi ofte diris, ke mi havu servon en fremda loko, ĉar tion havas ĉiuj aliaj knabinoj por lerni.“

„Jes, kompreneble mi estis dum unu jaro en lernejo en alia urbo por lerni mastrumadon,” sciigas fraŭlino Riedel.

„Tion mi ofte rekomendis al Mona,” diras la patrino. „Sed ŝi ĝis nun ne havis tempon. Estas ja tro malfrue decidi pri tio, kiam la geedziĝo jam estu preparata.“

„Mi certe neniam edziniĝos,” diras Mona.

„Ho, vi forgesas vian princon,” moketas Thor. „Estas vere, li ja malaperis. Sed li certe revenos iun tagon. Amo donos al li flugilojn.“

„Ĉu vi tion spertis?” diras Mona rigardante al fraŭlino Riedel.

Thor estas respondonta, kiam eksonis la sonorilo de la pordo. Ĉiuj mirigite aŭskultas pensante, kiu frapis.

Thor iras el la ĉambro por malfermi la pordon por la neatendita gasto.

23. Ĉapitro.

La restantoj en la ĉambro atente aŭskultas. Laŭ la interparolo ili tuj komprenas, ke estas fremdulo, kiu venis al la domo. Mona tre ekcitiĝas. La vangoj fariĝas unue ruĝaj, poste palaj, kaj ŝi tre nerveze kaj maltrankvile sidas sur la seĝo.

Mirigite fraŭlino Riedel rigardas ŝin: „Kio estas, amikino?“ ŝi flustras al ŝi.

„Ho, se estas li, mi forkuros, kiam ili envenos la ĉambron!“

„Li? Pri kiu vi parolas?“ demandas la ne komprenanta amikino.

Li — la fremda soldato, kiun Thor invitis.“

„Mi ne komprenas. Ĉu Thor invitis soldaton?“

„Jes, hieraŭ li parolis kun li en la urbo.“

„Do, estas la esperantisto, pri kiu vi diskutis?“

„Jes,“ diras iom hezitante la maltrankvila Mona.

„Se jes, li ja ne estas fremdulo, sed amiko de ni ĉiuj, kiuj ne nur pro lingva intereso, sed ankaŭ pro emo apartenas al la monda asocio esperanta!“

„Jes, sed mi . . .“

„Jen estas bezonata neniŭ „sed“, nur kompreno kaj certe ankaŭ kompato. Ĉu vi jam forgesis tion, kion mi rakontis al vi en la kursoj pri la interna ideo de Esperanto?“

„Ne, fraŭlino Riedel,“ lamentas Mona, „sed li tamen estas nia malamiko, kaj . . .“, ŝi haltas subite; konsternite ŝi rigardos al la pordo, kiu malfermiĝis. En la pordo aperas Thor kaj la gasto.

Mona eksaltis de sur la seĝo ŝajne por forkuri. Fraŭlino Riedel kaptis ŝian manon, kaj ŝi flustre per mola, sed tamen firma voĉo petegas al ŝi resti en la ĉambro. Mona rigidiĝas kaj restas staranta kun kunpremitaj lipoj.

„Jen,“ diras Thor kun gaja rideto, „estas amiko, kiun mi hazarde hieraŭ renkontis en la strato kaj invitis al nia domo. Lia nomo estas Ricard Werner.“

La mano, kiun firme tenas en la sia fraŭlino Riedel, tremetas. Fraŭlino Riedel rigardas la amikinson. La ruĝa koloro venas kaj malaperas de ŝia vizaĝo, kaj ŝi aspektas, kvazaŭ ŝi estus ŝvenonta.

„Gesinjoroj“, diras la fremdulo per agrabla voĉo, „mi petas vian pardonon pro mia alveno en tiaj vestoj, sed mi estas nur nulo en la granda ludo pri la regado de la mondo. Mi tre volonte estus veninta en pli konvenaj survestoj, sed mi devas obei. Dum monatoj mi aŭdis nur la sonojn le da pafiloj kaj la maŝinpafiloj kaj la akrajn vortojn de la oficiroj. Kiam mi hieraŭ hazarde ekvidis la verdan stelon kaj trovis malantaŭ ĝi esperantan amikon, mi sentis ĝojon grandan, kiel neniam antaŭe en mia vivo“.

Sinjoro Grann salutas lin kore, kaj pere de Thor li afable bonvenigas lin en sian hejmon. Ricard Werner danke akceptas la afablajn vortojn kaj salutas la aliajn. Mona donas al li sian tremetantan manon kaj rigardas al la planko, dum kiam ruĝa koloro kovras ŝian vizaĝon kaj kolon ĝis la limon de la robo. Fine li salutas fraŭlinon Riedel, kiu per ŝercaj vortoj bonvenigas lin kaj certigas al li, ke ĉiuj sendube ĝojiĝis konstatinte, ke inter la fremduloj troviĝas pacema homo.

La gejunuloj ŝerce interparoladas, sed subite frau-

lino Riedel rimarkas, ke Mona estas for. „Pardonu al mi, mi foriros momenton, s-ro Werner. Nur paroligu Thor, li bone lernis, sed li nur malkuraĝe uzas la buŝon“.

Tion mi vere ne konstatis“, ridis Werner, „sed li eble havas korbatojn, kiam li alparolu ĉarmajn fraŭlinojn, mi supozas“. „Ho, ĉu vi estas flatemulo, s-ro Werner“, diris f-ino Riedel kaj levis fingron minacante.

„Mi ne intencis tion almenaŭ, sed tamen mi eble trafis la veron“.

24. ĈAPITRO

Fraŭlino Riedel iris en la kuirejon. Tie ne estis Mona, nur la patrino: „Kie estas Mona?“ ŝi demandos la patrinon. Tiu per fingro montris la direkton al la koridoro.

„Ĉu ŝi iris el la domo?“

S-ino Grann prenas la brakon de f-ino Riedel kaj kondukas ŝin al la pordo de la ĉambro de Mona. Ŝi kapsignas al ŝi por diri: „Bonvolu eniri,“ kaj foriras.

Fraŭlino Riedel staras momenton antaŭ la fermita pordo nedecidema. Singarde ŝi malfermas la pordon. Sur seĝo antaŭ la tablo sidas Mona, ŝi metis la kapon sur la tablon, kaj la larmoj torente fluas. Fraŭlino Riedel staras momenton malantaŭ la amikino. Tiam ŝi ekvidas bildon en unu el la manoj de Mona, kaj nun ŝi ekkomprenas la tutan aferon. La foto montras junan kaj ĉarman sinjoron en civilaj vestoj. Antaŭ kelkaj minutoj tiu sinjoro venis en ĉi tiun domon. Estas Ricard Werner.

Ŝi singarde metas manon sur la ŝultron de la ploranta amikino. „Mona, kara Mona, ne ploru, sed levu vin. Mi tute komprenas vin.“

„Lasu min,“ plorsingultas la malfeliĉa knabino.

„Mona, mi estas via amikino, ĉu ne?“

„Jes, sed vi ne povas helpi min. Neniu povas helpi min!“

„Mi ne postulas, ke vi estu prudenta, ĉar en tiaj aferoj estas la koro kaj ne la cerbo, kiu ordigu la aferon, sed tamen mi petas vin sekigi viajn okulojn kaj donu al mi eblecon por trankvile interparoli kun vi pri tio, kio premas vin, amikino.“

„Tio ne utilos, mi neniam fariĝos feliĉa!“

„Ho, nun vi troigas, kara Mona. Ni estas bonaj amikinoj. Ĉu ne?“

Mona nur kapjesis.

„Se la bona Dio tion volas, mi eble iun tagon fariĝos pli ol via amikino, via parenco. Al mi vi libere parolu. Vi scias, ke vi povas fidi min. Eble mi ne povas helpi, sed mi certe povas konsili vin.“ Fraŭlino Riedel kaptas la manon de la amikino, en kiu estas la foto. „Li vere estas ĉarma homo, s-ro Werner, kaj li certe estas ankaŭ bonkora,“ ŝi flustras al ŝi.

„Jes, sed kial li apartenas al tiuj teruraj homoj?“

„Vi ne estu tiom malprudenta. Tion li ja ne mem okazigis. Mi ankaŭ ne apartenas al via popolo, mi eĉ apartenas al tute alia gento. Ĉu vere estus al vi strange, se mi fariĝus via parenco?“

„Ne, vi ja ne estas fremda al mi.“

„Ĝuste. Li ankaŭ ne estas fremda al vi, vi ja konas lin jam longan tempon, kaj estas maljuste, ke vi malfidas lin pro tio, ke li soldatiĝis devige, se vi entute havas sentojn por li“.

„Mi amas lin,“ flustras Mona plorvoĉe.

„Se via amo ne estas pli forta ol via malsimpatio kontraŭ soldataj vestoj, ĝi valoras neniom, tiam estos pli bone, ke vi lasos lin.“

„Ho,“ ĝemetas Mona, „mi estas malfeliĉa homo. Kion mi faru?“

„Kiel mi jam diris. Sekigu viajn okulojn kaj iru kun mi al la aliaj. Se vi faros tion, la afero ordiĝos per si mem.“

Iu frapetis la pordon. Sinjorino Grann malfermis ĝin dirante: „Ho, ĉi tie vi estas, mi vere ne sciis, kie mi trovu vin. La sinjoroj bezonas vin,“ ŝi ridis bonkore palpante al f-ino Riedel.

„Cetere, la kafo estas preta.“

„Dankon,“ ridetas f-ino Riedel, „ni tuj venos. Ni nur havis ion por priparoli sekrete.“

„Jes, mi komprenas, la junulinoj havas sekretojn antaŭ ni pli maljunaj.“ Ridetante ŝi minacis per fingro al ili.

Gaje ŝercante f-ino Riedel kaj sino Grann brakon en brako kun Mona iras al la kafotablo.

25. Ĉapitro

La kafotrinkado okazas en bona harmonio. Por la Grann-familianoj la kunesto estas tre interesa kaj nekutima afero. Anoj de tri diversaj nacioj estas en la ĉambro. Kvankam gesinjoroj Grann ne komprenas la internacian lingvon, kiun scias paroli la gejunuloj, ili tamen sentos la bonan harmonion inter la gejunuloj. Mona ne multe babilas, sed, fraŭlino Riedel faras ĉion eblan por enigi ŝin en la interparoladon kun Ricard Werner kaj Thor.

Vidinte, ke la afero ne prosperas, ŝi ŝanĝas sian taktikon. Lasante ŝin sidi sola kaj muta, ŝi okupas sin nur pri Werner. La du spertuloj vigle interparolas pri travivaĵoj en la vasta mondo antaŭ la milito. Evidentiĝas, ke ili havas komunajn gekonatojn, ĉar fraŭ-

lino Riedel travojaĝis ankaŭ lian landon. De tempo al tempo Thor demandas pri io ajn.

Post la kafotrinkado iras gesinjoroj Grann el la ĉambro kaj lasas la babiladon al la gejunulo. Fraŭlino Riedel kaŝe rigardas al Mona kelkajn fojojn. Ŝi komprenas, ke la nova taktiko jam efikis. La esprimo de ŝia vizaĝo montras envion al la amikino, kvankam ŝi klopodas ŝajnigi indiferenta. Supozante, ke nun venis la ĝusta momento, ŝi direktas demandon al Mona tiel, ke ŝi devos respondi kaj al ŝi kaj al Werner. Ricard Werner feliĉe kaptas la okazon por interparoli kun ŝi. Jam longe ŝajnis al li, ke ŝi estas tro neparolema. Tute nature kaj senĝene li dankas al ŝi, ĉar ŝi sendis al li afablajn leterojn, kaj petas ŝin pardoni, ke ŝi eble ne ricevis lian lastan leteron sendita ĝuste antaŭ la eksplodo de la milito. Antaŭ ol Mona scias, ŝi vikle kaj fervore diskutas kun li pri la tempo de la alveno de la lasta letero. Tiel fervore kaj gaje ili interbabilas, ke ŝi tute ne rimarkis, ke fraŭlino Riedel kaj Thor malaperis.

Konstatinte, ke ili estas solaj en la ĉambro, ŝi momenton fariĝas moltrankvila. Ricard Werner vidas tion, kaj gaje ridetante al ŝi li diras: „Eble nia interesa parolado pri la korespondado ne interesis niajn geamikojn, sed tio ja ankaŭ ne gravas, se nur ĝi estas interesa por ni men.“ Mona nun spertas, ke Ricard Werner ne nur estas ĉarma laŭ aspekto, sed ankaŭ laŭ konduto. Kiel roseroj forvaporigis en la radioj de la varma suno en somera frumateno, tiel ŝia ĝenemo malaperis, kaj tute nekonscie ŝi envolviĝas en la sorĉan atmosferon de la amo.

„Ĉu vi vere mem trovis min laŭ mia adreso?“ demandas Mona.

„Ne, tute hazarde mi renkontis vian fraton en la

strato, sed efektive mi trovis la vojon pere de la verda stelo, kiun portas via frato sur la jako. Nur post nia interparolado mi ekkomprenis, ke li estas via frato.“

„Ĉu vi tiam rakontis tion al li?“

„Ne. Nur kiam li estis invitinta min, mi informis lin pri nia korespondado. Cetere mi supozis, ke li jam sciis tion. Eble tio estas nur imago.“

„Ne, vi certe pravas. Thor kaj mi neniam havis sekretojn unu antaŭ la alia, kaj mi montris al li la leterojn kaj cetere mi montris al li vian nomon.“

„Do, la bona Dio volis, ke mi facile trovu la vojon ĉi tien, Mona. Ĉu Li ankaŭ helpos min trovi la vojon al via koro?“

„Vi certe ne bezonos helpon, sinjoro Werner,“ flustras Mona ruĝiĝante.“

„Mi ne kuraĝas kredi tion, ĉar mi ankoraŭ estas sinjoro Werner, Mona!“

„Ricard! . . . Se nur tiu terura milito ne estus. Mi vere afliktiĝas. Mia koro kaj mia prudento malbone kunlaboras.“

„Kara Mona, mi komprenas vian animstaton, sed vi ja scias, ke mi estas devigita surprizi soldatajn vestojn. Mi ne povas senti malamon kontraŭ iu ajn en la mondo. Mi petas al la bona Dio, ke mi neniam estos devigata pafmortigi alian homon, kaj mi deziregas, ke tiu ĉi malbenita milito baldau finiĝos!“

„Ĉu vi kredas, ke en la mondon iam venos paco?“

„Pri tio neniuj homoj ekzaktan scias, sed mi estas certa pri tio, ke ni post la milito havos gravan taskon, ĉar Esperanto povos savi la homaron de la abismo.“

26. ĈAPITRO

Mona kaj Ricard iras en la ĝardenon por serĉi la

aliajn. Thor kaj f-ino Riedel trovis belan lokon en la nefermita ligna dometo en angulo de la ĝardeno.

„Bonvolu eniri,“ ridas Thor, „estas sufiĉa loko ankaŭ por vi.“

„Ŝajnas al mi, ke vi estas iom seriozaj,“ diris f-ino Riedel. „Ĉu vi pritraktis gravajn aferojn?“

Efektive ni tion faris,“ ridetas Ricard Werner. „Ni parolis pri la malfeliĉa homaro dum kaj post la milito.“

„Se vi sentas respondecon pri tia malfeliĉa stato, mi facile komprenas viajn seriozajn mienojn. Mi supozas, ke vi ankoraŭ ne trovis solvon de la problemo, ĉu?“

„Ne, solvon ni ne trovis, sed tamen —“

„Do vi havas proponon!“

„Jes kaj ne. Ni havas kredon. Ni interkonsentis pri tio, ke se ekzistos ebleco por savi la mondon post la milito, Esperanto fariĝu unu el la faktoroj, kiuj havigu al la kompatinda homaro la pacon.“

„Estas tre interese tion aŭdi, ĉar Thor kaj mi ĵus parolis pri vi, kaj ni estis tute certaj pri tio, ke vi utiligis la okazon kaj interparolis ne pri la malfeliĉa mondo, sed pri viaj propraj sentoj kaj sopiroj!“

„Ankaŭ tion ni efektive faris, sed ĝuste tial ni konsciiĝis pri tio, ke kiam la mondo ĉirkaŭ ni suferas, ni ne rajtas senti nin feliĉaj.“

„Vi vere estas komprenemaj,“ ridas Thor.

„Ne pli ol vi, sed ni memoras, ke ni mem estas parto de la malfeliĉa mondo, tial ni neniam povos senti plenan feliĉon, antaŭ ol la stato de la tuta homaro pliboniĝos.“

„Jes, vi pravas,“ respondas f-ino Riedel serioze. „Ankaŭ mi neniam dubis pri la utilo de Esperanto

koncerne al la paco, sed ĉu vi kredas, ke la homaro akceptos la manon etendatan?"

„Estos ĝuste nia tasko komprenigi la mondon pri tio," diras Thor fervore.

Ankaŭ Mona partoprenas la diskutadon pri la gravaj problemoj postmilitaj. Ŝi opinias, ke la plej multaj esperantistoj ne komprenas la veran sencon de la interna ideo de la majstro.

Thor tuj kontraŭdiras tion: „Ĉiu prudenta homo ne povas ne kompreni tiun ĉi memkompreneblan flankon de la esperanta movado," estas liaj vortoj.

„Tute male laŭ mia opinio, amiko," diras Ricard, kaj Mona triumfante kaj ruĝiĝante pro fiero rigardas la fraton.

„Vi parolis pri prudentaj homoj," daŭrigas Ricard. „La prudentaj kaj trofidaj homoj estas tiuj, kiuj malhelpas la disvastigon de la interna ideo. Se tiu grandioza ideo privenku la mondon, ni bezonos ne saĝajn kaj prudentajn homojn kun malvarmaj kaj malmolaj cerboj kaj koroj, sed homojn sentemajn kun grandaj koroj."

„Jes, vi pravas," certigas f-ino Riedel fervore. „Antaŭ la milito ni eble povus trovi aron da tiaj homoj, sed mi timas, ke la terura batalo kreas tiom da maldamo, ke eĉ la plej molaj koroj ŝtoniĝos."

„En la nuna momenta tiu penso estas natura sekvo," diras Ricard kun varmo en la voĉo. „Sed mi tamen kredas, ke vi malpravas, samideanino." Entuziasme li parolas, kaj Mona sekvas liajn vortojn kun brilantaj okuloj kaj ardantaj vangoj.

„Rigardu, karaj geamikoj," daŭrigas Werner post paŭzeto. „Se dum longa tempo la vetero estas varmega, kolektiĝas en la aero tiom de elektraĵo, ke tio devas je certa tempo rezultigi fulmontondron. Same

la malamo, kiu amasiĝis, ne dum milito, sed antaŭ ĝi, ĉar ĝuste la malamo kaj la profiteco estigas la malpacon.“

„Jes,“ diras f-ino Riedel penseme, „sed ĉu vi opinias, ke militado ne fortigas la malamon inter la popoloj?“

„Nur malmulte tamen. Mi kredas, ke la militfarado en pli alta grado aperigas la amon. Vi scias, ke inter kompatito kaj amo nur estas mallonga vojo. Multaj homoj ĉi tie estas pli malpli ĝenataj de la fremda armeo, sed malamon oni ne sentas al la soldatoj, tion mi jam spertis, ne nur en tiu ĉi ĉarma rondo. Ne nur la soldatoj, sed multaj homoj en la mondo suferegas pro la milito, kaj tiu granda sumo da malfeliĉo kaj korpa kaj anima suferado alvokas kompatemon kaj helpemon. Nia afero estas laŭ mia opinio nur, ke ni utiligu tion.“

„Ni devos tion, ĉu ne!“ diras f-ino Riedel fervore.

„Jes, tion ni promesas,“ deklaras Ricard kun serena voĉo.

Mona kaj Thor kapjesas, kaj en tiu bela angulo de la mondo kvar manoj renkontiĝas en firma premo.

27. ĈAPITRO

Vesperigis. La gastoj forlasis la vilaon. Oni vespermanĝis, kaj post la manĝado ĉiu trovis okupon.

Lisa jam enlitigis la pupojn: „Plejbone estas, ke la etuloj frue enlitigas,“ ŝi diras gravmiene. Post tio ŝi okupas sin per legado de semajna gazeto ilustrita, sed Fokso, kiu kuŝis en la angulo, iakaŭze komencas provi ludigi ŝin. Ĝi mordetas la ŝuojn de Lisa, kaj fine ĝi sukcesas tiri unu el ili de sur la piedo. Tiam la afero evoluigas. Lisa petas Fokso-n reveni kun la ŝuo. Ĝi staras meze en la ĉambro kaj gardas la ŝuon,

kiu kuŝas sur la planko, dum kiam ĝi kaŝe rigardas al ŝi per petola rigardo. Lisa estos levanta sin, sed la atentema hundo tuj ekkuras malantaŭ la tablon tenante la ŝuon inter la dentoj. Nun komencas vigla ĉasado. Fokso ĉiam gajnas la vetkuradon, ĉar ĝi pro sia malgrandeco povas gliti inter la seĝojn kaj tablojn.

Subite eksonas la porda sonorilo. Fokso surprizite ekbojas kaj kuras al la pordo tute forgesante la interesan ludon.

„Kiu venas nun?“ diras sinjorino Grann mirigite.

„Nu, jes,“ respondas la edzo, „estas ja ne malfrue ankoraŭ, povas esti kiu ajn. Ĉu vi esploros, Thor?“ li daŭrigas. „Eble estas nur kolportisto.“

Thor eksaltas kaj kuras al la pordo. Fokso certe kredas, ke li volas ludi; ĝi komencas ĉirkaŭsalti kaj bojeti.

„Fermu la buŝon, hundaĉo,“ diras Thor kaj per unu mano li kaptas ĝin kaj glitigas ĝin sur la glata linoleuma planko, kuras el la pordo kaj fermas ĝin malantaŭ si.

La aliaj atente aŭskultas kaj konstatas, ke ne estas fremdulo, ĉar Thor bonvenigas lin kaj petas lin iri en la ĉambron. Tamen neniu rekonas la alveninton laŭ la voĉo. La pordo malfermiĝas. Ili eniras, kaj nun evidentiĝas, ke estas najbaro, konata homo, sed tamen homo, kun kiu ili nur hazarde estas parolintaj indiferentajn vortojn, kiam ili renkontiĝis en la strato.

„Bonan vesperon,“ diras la najbaro, „kaj pardonu, se mi ĝenas vin.“

„Ne, per via alveno almenaŭ ne,“ estas la afabla respondo de sinjoro Grann. „Bonvolu sidiĝi. Fokso, kuŝigu vin en vian angulon!“ „La hundo estas iom scivolema,“ li diras, „sed tiaj estas ja la hundoj.“

„Jes,“ respondis la najbaro kaj kraĉotusis embarasita. „Eble ankaŭ vi scivolas pri la kaŭzo de mia alveno?“

„Nu, jes, se vi venis ĉi tien kun ia intenco, estas ja pli bone, ke vi malkaŝos ĝin.“

„Mi esperas, ke vi ne ofendiĝos pro miaj vortoj; nur kun bona intenco mi venis por diri ion al vi.“

„Eĉ se mi nenion povas promesi al vi, mi petas vin paroli.“

La najbaro klinis sin antaŭen kaj fikse rigardante al Grann li diras: „Vi havis gastojn hodiaŭ!“

„Jes, vere, tion ni havis,“ respondas Grann atendante.

Mi bedaŭras, ke mi estas divigata diri al vi, ke tio estas nekovena afero, tre estimata najbaro.“

„Kion? Ĉu havi gastojn?“

„Ŝajnas al mi kaj al multaj aliaj najbaroj, ke estas tre hontiga afero, ke vi gastigas unu el la malamikoj de nia lando!“

Laŭ la vestoj li eble ŝajnas esti malamiko de nia lando, sed li estas amiko de miaj filo kaj filino, kaj iliaj amikoj estas ankaŭ miaj!“

„Estimata najbaro, ĉu vi ne vidas, ke tia stultajo havigas al vi multajn malamikojn en nia vilaĝo?“

„Eble estos pli bone, ke vi lasos la titolon „estimata“. Ĉar laŭ viaj vortoj mi jam ne meritas ĝin.“

„Guste tial mi venis tien ĉi por provi komprenigi tion al vi. Ni ja estas najbaroj, kaj mi nur bonintence diras tion!“

„Mi dankas vin pro via jam kelkfoje menciita bona intenco,“ respondas Grann per malmoligita voĉo, kaj li forte akcentis la vortojn „bona intenco“.

„Estas ne nur mi kaj mia familio, kiuj bedaŭras tion, sed multaj aliaj najbaroj en nia vilaĝo.“

„Dankon, sinjoro. Eĉ se vi povus kolekti ĉiujn loĝantojn de la tuta grandurbo, estus viaj klopodoj vanaj. Pri mia konduto vi povos opini laŭplaĉe, nur Li, kiu estas super ni ĉiuj, juĝu pri mia faro nun kaj poste. Thor, ĉu vi bonvolas akompani la sinjoron al la pordo.“

„Ĉu vi montros al mi la elirejon? Tion vi pentos!“

„Mi ne montros al vi la elirejon, sed mi diras al vi senkaŝe, ke estas senutila faro perdi vortojn kaj tempon koncerne tion, pri kio mi jam decidis, antaŭ ol vi envenis ĉi tiun ĉambron.“

Ofendite la najbaro ekstaris kaj eliris senvorte.

„Patro, mi estas malfeliĉa, ĉar mi kulpas tion,“ diras Mona duone ploranta.

„Kion Dio kunigis, homoj ne disigu. Via patrino kaj mi portos eventulalajn malagrablaĵojn. Se ne estas nur ludo por vi, vi ankaŭ havos fortojn por elteni.“

„Mi pensis nur pri vi. Mi eble poste iros aliloken, sed vi devas resti ĉi tie.“

„Tio ne gravas, Mona. Se ni bezonos helpon, ni tamen ne atendos ĝin de la najbaroj, kaj hodiaŭ ni feliĉe ŝuldas al neniuj.“

„Dankon, patro, tion mi neniam forgesos!“

„Eĉ se vi poste iros alilanden? diris la patro kun rideto.

„Ne, kien ajn mi iros, mi neniam forgesos vin kaj mian karan hejmon.“

28. ĈAPITRO

La malfacilaĵoj kuŝas pezaj sur la loĝantaro de urboj kaj urbetoj. Komencis labori la malpaciguloj precipe inter la laboristoj, kies vivkondiĉoj ne estas tre bonaj. Amasoj da senlaboraj homoj staras dum la

la tago sur la stratanguloj kaj antaŭ la gazetfenestroj kaj diskutas. Ĉar nur malmulte oni ekscias pere de la gazetoj, la onidiroj disvastiĝas fulmrapide. Onidiroj pri bataloj inter burĝanoj kaj policistoj aŭ la fremdaj soldatoj.

La policistoj iras duope kun la pafilo sur la ŝultro kaj kasko sur la kapo. En la komenco ili afable kaj trankvile petis la amasojn disiri, sed iom post iom tio ne sufiĉis, kaj la diskutantoj nur hezitante kaj murmurante flankeniris por tuj reiri, kiam la policistoj pasis la lokon.

Oni ankaŭ komencis flustri pri strikoj. Ankoraŭ okazis nenio en tiu direkto, sed la onidiroj ŝvarmas kiel kuloj en varma somera vespero, kaj ili fariĝas pli ekzaktaj. Dum longa tempo la taga vivo marŝis preskaŭ regule, sed nun oni denove komencis troprovizadi pro la timo pri strikoj, kiuj haltigus multajn fabrikojn, se ili efektiviĝus.

Niaj kvar gejunuloj ĉiam rilatas malgraŭ la diversaj ĝenaĵoj.

Ili decidis renkontiĝi foje en la urbo por kune ĝui muzikon kaj kafon en restoracio. Thor jam antaŭe trovis konvenan lokon. Nun sidas niaj geamikoj en la unua etaĝo apud fenestro kaj havas belan elrigardon sur la grandan placon. Kafon ili jam ricevis. La orkestro ludas bele sed mallaŭte, ĉar ili sidas en sufiĉa distanco de la orkestro, ili nur aŭdas ĝin malforte.

Thor intence elektis tiun lokon. Tie ili ne estas pri-rigardataj de aliaj vizitantoj, ĉar ili estas duone kaŝitaj malantaŭ grandaj kolonoj.

„Oni fakte povus forgesi, ke ekzistas malamikeco en la mondo,“ komencis Ricard post longa paŭzo, dum kiu la orkestro silentis, sed la zumado de babilantaj voĉoj de multaj homoj atingis iliajn orelojn.

„Eĉ en la stratoj la vivo ŝajne estas ordinara,“ daŭrigas f-ino Riedel, sed subite ŝi haltis, kaj la aliaj, kiuj estis rigardintaj al ŝi, dum kiam ŝi parolis, sekvis la direkton de ŝia rigardo. Mona metis sian manon sur la brakon de Ricard, kaj li rimarkas, ke ĝi tremetas. Ĉiuj fikse rigardas al la plej malproksima loko de la granda placo, ne sciantaj, kio okazas, kaj tamen ili divenas, ke estas malbona afero. Amaso da homoj kunpuŝiĝas, ŝajnas al ili, ke inter la kunpuŝantaj kaj batalantaj homoj ankaŭ troviĝas soldatoj. Subite eksonas terura kriego, kvazaŭ de homo agonianta. En la sama momento komencas fajfado el diversaj direktoj. La kunpuŝanta amaso urĝe disiĝas, kaj krientaj homoj kuras en ĉiujn direktojn. La kvar gejunuloj sidas kelkajn momentojn kiel ŝtonigitaj. Perceptante la danĝeron Ricard eksaltas de sur la seĝo kaj tiras Mona kun si malantaŭ la muron duonfluŝante al Thor kaj f-ino Riedel: „Gardu vin, estas danĝere sidi antaŭ la fenestro!“

Oni povus kredi, ke ĉiuj demonoj de la infero liberigis. Pafoj krakas, viroj krias, kaj virinoj laŭte lamentas. Estas terura tumulto. De angulo ekvenas tondrante militaŭto, apenaŭ alveninte ĝi komencas pafadi laŭlonge de la malplenaj stratoj. Kiam la militaŭto forveturas, alvenas policista aŭto. Ĝi haltas meze sur la granda placo, kaj per laŭtparolilo oni donas informojn: „Estas malpermesate iri tra la stratoj de post la oka horo vespere. Ĉiuj soldatoj devos tuj aliĝi al sia regimento. Ĉiu, kiu ne agas laŭ tiuj ordonoj, estos severe punata!“

Niaj geamikoj sidas paralizitaj, kaj mano trovis manon. Thor estas la unua, kiu ekhavas la parolkapablon. Li diras per voĉo ne tro certa: „Kioma horo estas?“

„Kvaronon antaŭ la oka,” sciigas Ricard.

„Kaj ni bezonos minimume 20 minutojn por iri hejmen. Nu, tio tamen ne gravas, se nur ni povos atingi la eksteraĵon de la urbo antaŭ la oka; mi scias flankenvojeton, laŭ kiu ni povos iri senriske.”

„Mi ne povos atingi mian loĝejon antaŭ la oka, kaj mi scias neniun flankenvojon,” ridetas fraŭlino Riedel per ne tro gaja rideto.

„Eble mi povus akompani vin,” proponis Ricard ĝentile.

„Jes, dankon. Kaj ni ambaŭ sendube estos arestataj. Ne, mi certe devos resti ĉi tie ĝis morgaŭ matene.”

„Eble mi scias pli bonan solvon de la malfacila problemo,” diras Thor rapide. „Vi iros kun ni hejmen, kaj morgaŭ ni vidos, kiel statos la afero.”

„Dankon, sed viaj gepatroj eble ne ŝatos gaston, kiu ne estas invitita.”

„Tie, kie la koroj estas sufiĉe grandaj, ankaŭ la domo sufiĉos. Do, geamikoj ni devos urĝe adiaŭi, por ke ni ne ankoraŭ pli malfruiĝu.”

La tri adiaŭas al Ricard per ŝercemaj vortoj. Longe li tenas la manon de Mona en sia kaj per gaja rideto provas kuraĝigi ŝin dirante, ke li kiel eble plej baldaŭ venos por viziti ilin.

Rapide la tri irantoj duone kurantaj pasas la stratojn. Ĉie ili renkontas homojn, kiuj iras kaj kuras al pli sekura loko ol la danĝeraj stratoj. Kelkfoje ilin rekontas polica patrolo, kaj unu fojon venas tondrante militaŭto, sed neniuj ĝenas ilin. Foje ili ankaŭ aŭdas pafadon. Feliĉe tiu pafado ŝajne okazas en malproksima kvartalo de la urbo. Du minutojn antaŭ la oka ili atingas la eksteraĵon de la urbo, kaj la du minutojn ĝuste sufiĉas por atingi la vojeton, kiu kondu-

kas malantaŭ la vilaĝo tra bela arbareto. Singarde kaj malrapide ili iras laŭ la vojeto. Thor estas kelkajn paŝojn antaŭ la du knabinoj, kiuj iom nekuraĝaj manon en mano sekvas lin. Atinginte la lokon, kie la vojeto kurbiĝas kaj kondukas el la arbaro en la vilaĝon, li haltas kaj mallaŭte klarigas al ili, ke nun ili devos suriri la straton kelkajn metrojn por atingi la hejmon.

„Jen vidu,“ li diras, „estas angulo ĉe la ruĝa domo tie, tien mi iros, kaj se nenia danĝero minacos, mi faros mansignon al vi, kaj vi tiam kiom eble plej rapide kuru al mi!“

Timemaj ili vidas lin ŝteliri laŭlonge de la verdaj ĝardenbariloj kaj atingi la angulon. Kiam li fine faras mansignon al ili, ili kuregas. Kelkajn minutojn poste ĉiuj estis en „Espero“, kie oni ege surpriziĝas aŭdante pri la malagrabra kaj ne sendanĝera travivaĵo. La neatendita gasto estas kore kaj varme bonvenigata.

29. ĈAPITRO

Tagoj pasis. Teruraj tagoj kun pafado kaj tumulto en la stratoj. Senkulpaj homoj estis pafataj survoje al laboro aŭ kiam ili devigitaj de malsato iris eksteren por aĉeti manĝaĵojn. La laboristoj komencis striki. Antaŭ fabriko ekestis ial tumultoj. Soldatoj alkuris kaj komencis pafadi. Du laboristoj estis mortpafitaj, aliaj danĝere vunditaj. Ĉiuj laboristoj en tiu fabriko proteste ekstrikis post kunveno en la fabriko. La postan tagon pluraj fabrikoj estis blokitaĵ, ĉar la laboristoj simpatie subtenis la komencintojn. La butikoj iom post iom malpleniĝis, unuavice la butikoj kun manĝaĵoj. La granda urbo tremis. Dumtage estis danĝere pasi la stratojn, dumnokte estis neeble por civilaj homoj.

Komencis agi la sabotantoj. Homoj, kiuj ne nur malamis la fremdulojn, sed ankaŭ ĝenis ilin kiom eble plej multe. Dumnokte aŭdiĝis teruraj eksplodoj. Kaŝitaj de nokta mallumo la kontraŭuloj metis bombojn en fabrikojn kaj riparejojn, kiuj faris laboron por la fremduloj. Bedaŭrinde tiaj agoj malutilis ankaŭ al la urbanaro. Fenestraj vitroj estis frakasitaj, kaj oni devis pendigi sakojn kaj paperojn antaŭ la fenestrojn.

En la vilaĝo la ĉirkanstancoj ne estas tiom teruraj. Oni aŭdis la eŝon de la noktaj eksplodoj kaj dormadis malbone, sed tamen pli sekure ol en la urbo. Kelkaj manĝaĵoj mankas en la butiketoj, sed en la ĝardenetoj oni kulturas legomojn, kiuj sufiĉus por longa tempo, eĉ se oni ne havus aliajn aĵojn. Nur malofte oni vidas soldatojn. Okazis tamen, ke militaŭto ton-drĉis preter „Espero“ dum la nokto, kaj la vekiĝintoj vidis, ke fortega lumo trafenetras la mallarĝajn nekovritajn striojn de la fenestroj inter la kurteno kaj la muro.

Thor kaj lia patro iras kune al laboro. Thor lasis la biciklon, kaj ambaŭ nun iras per la strataŭtobuso. Mona feliĉe ne devos iri al la urbo, en sia laborejo la laboristoj strikas. Ŝia animstato estas ankaŭ tia, ke estus senutile sendi ŝin al laboro.

Post la terura travivaĵo en la urbo si nek vidis nek aŭdis ion pri Ricard. Fraŭlino Riedel, kiu iris kun ili al „Espero“ tiun vesperon, restas ankoraŭ ĉe ili. „Vi ja havas nenion por fari en la urbo, kaj ni havas sufiĉe da loko por vi!“ ridetis sinjorino Grann, kiam ŝi kelkfoje komencis paroli pri reiro. Estas granda helpo, ke ŝi restas. Senlacige ŝi provas vigligi la amikinojn, kaj s-ino Grann estas tre danko al ŝi pro tio, ĉar ŝi havas sufiĉe da laboro en sia hejmo. Ĉiun tagon ŝi devas purigi la tutan domon, kaj krom tio ŝi prizorgu la

manĝon por kvar kreskuloj. La doloretojn de la infanoj ŝi ĉiam sciis forigi, dum jaroj pasis, sed kiam ili tiel altiĝas kiel nun, ŝi fakte ne kapablas tion sen ia helpo. Krom la ordinara domlaboro ŝi nun ĉiutage devas multe pripensadi la nutraĵon. Tiu demando post la milito tre malfaciliĝis. La varoj fariĝis tro multekostaj, kaj samtempe la kvalito de preskaŭ ĉiuj aĵoj plimalboniĝis. Cetero multaj el la tre necesaj varoj malaperiĝis de la butikoj. Ili estas akireblaj en la tiel nomataj „nigraj butikoj“, tio estas malpermesataj vendejoj, plej ofte ne havantaj certan lokon en iu domo, sed ĉe la stratanguloj. Kompreneble la prezoj en tiaj vendejoj estas ne pageblaj por ordinaraj homoj. Eĉ ne la sinjoroj volis tien iri, kiam ili suferegis pro manko de tabako.

Mona ne plendas, sed tio nur malfaciligas la aferon. Ŝi ankaŭ ne ploras. Ŝajne ŝi elploradis dum longaj sendormaj noktoj, pensas la patrino. Kelkfoje ŝi ekzamenis la liton de Mona en la mateno kaj trovis malsekajn kusenojn. Kiam ĉiuj en la vesperoj kolektiĝas ĉirkaŭ la tablo, kaj la aliaj pasigas la tempon per ludado kaj ŝercado, ŝi sidas silenta kaj muta sur sia seĝo, kaj estas tre malfacile paroligi ŝin.

Thor kompreneble estas tre ĝoja, car fraŭlino Riedel estas ĉiam ĉe ili, sed pro la animstato de la fratino li tamen ne plene povas ĝui la feliĉon. Kiam li iris al kaj de sia laboro en la urbo, li tre zorge ekzamenis ĉiujn grupojn da soldatoj, kiujn li preterpasis, esperante, ke li ekvidas la amikon de la fratino. Tiam li almenaŭ povus sciigi al ŝi, ke la karulo estas vivanta. Sed bedaŭrinde liaj klopodoj ĝis nun estis vanaĵ. Li pro la malpaco inter la urbanoj kaj la fremduloj ne kuraĝis demandi iun ajn soldaton, ĉu li eble konas Ricard Werner kaj bonvolos porti al li sciigon

aŭ saluton. Li tute ne timas la fremdulojn, li scias, ke multaj el ili estas pacemaj homoj, kiuj estas devigitaj fari soldatservon same kiel la amiko. Sed li timas, ke liaj nacioj vidante lin paroli kun ili, kole-riĝu kaj faru skandalon sur la strato.

Profunda mallumo ŝvebas ĉirkaŭ „Espero“. Ĉio estas trankvila kaj silenta ekster la domo; eĉ ne folieto moviĝas. En la domo ĉiuj dormas, kaj tamen ne. En la ĉambro de Mona la dormo de Mona estas maltrankvila. Mona dormis kaj maldormis, la pensoj pri la sorto de la amato ne lasas ŝin kvieta. Timigaj supozoj turmentas ŝin tage kaj nokte. Plej teruraj ili estas dum la nokta soleco, kiam mallumo regas interne kaj ekstere.

Denove malpermesas al ŝi trankvile ripozi tiuj malhelaj pensoj. Mona sin ĵetas tien kaj reen en la lito ne povante trovi ripozon. Fine ŝi ellitiĝas. Surmetinte la plej necesajn vestojn ŝi ekstaras ĉe la fenestro. Ŝi rigardas en la belan nokton, sed la densa mallumo kaŝas eĉ la plej proksimajn arbojn kaj arbustojn.

Subite ŝajnas al ŝi, ke io moviĝas sur la ĝardena vojeto. Ŝia sango glaciigĝas, kaj nesupozebla timo ligas ŝian langon. Ŝi eĉ ne kapablas sin movi. Strange estas. Ŝajnas al ŝi, ke ŝi aŭdas homan voĉon, kiel en dormo ŝi aŭdas sian propran nomon: „Mona! Mona! Ne timu — estas mi, Ricard!“ „Ricard?“ Varmegaj sentoj tra-iras ŝian bruston. La rigidaj membroj liberiĝas de la forta premo. „Ho, amiko! Mi sopiris, sopiradis al vi dum tagoj kaj noktoj. Venu!“

En la ĉirkaŭbrako de fortaj brakoj Mona forgesas sendormajn noktojn kaj negajajn tagojn. Demandoj flugas al li, kaj li respondas pri la malfacilaĵoj, kiuj malhelpis al li veni.

Sed kion li ne rakontas, estas, ke li devos foriri, kaj

tute ne scias, ĉu li entute revenos. Li ne havas koron por tion diri al ŝi. Li scias, ke li mem bezonos ĉiujn fortojn por elteni la estontajn sopirojn.

„Mona“, li flustradas ameme, „la plej ĉarmega knabino de la mondo. Mi petas vin ne plendi kaj ne lamenti, se ni ne revidos baldaŭ. Ni ambaŭ fidu al la estonto kaj firme kedu, ke ni malgraŭ ĉio unuiĝos. Mi ŝteliris tien ĉi kaj mi ŝteliros reen, kaj vi pro tio ne timu. Mi trovos la vojon facile, kaj nenio malbona okazos al mi. Vi estos forta, ĉu ne?“

„Jes, Ricard. Mi tamen timas, kiam mi aŭdas pafadon. Mia koro batas pro malbonaj antaŭsentoj“.

„Sed estonte vi ne timu, nur esperu. Jen Mona, estas la verda stelo. Kaŝe mi portis ĝin malantaŭ la jako ĉe mia koro. Kie estas la via? Prenu ĝin. Per kiso ni benas la stelojn, kaj estonte ili igu nin neniam forgesi, ke verda estas la espero!“

Ŝanĝinte la verdajn stelojn ili per arda kiso adiaŭis.

Post lia foriro Mona longe staras ĉe la fenestro. Esperante, ke la amiko atingos sian loĝejon, ŝi fine enlitiĝas. Tiun nokton Mona bone dormadis kun feliĉa rideto en la vizaĝo.

Sur la kadron, kiu enkadrigas la foton de la amato, Mona fiksas la verdan stelon. La foto staras sur tablo antaŭ la fenestro. Okazas, ke ŝi estas malespera, kiam malhelaj tagoj pasas. Sed kiam la suno staras alte sur sennuba ĉielo, kaj la radioj trafas la fenestron, la verda stelo brilas kaj revivigas la esperon. Pli ĉarma ĝi tamen estas dum lunaj noktoj, kiam ŝi, kuŝante en la lito, vidas la brilantan stelon super la karaj trajtoj de la karulo. Tiam ŝi rememoras liajn vortojn, diritaj en ĉarma vespero kaj endorminte ŝi sonĝas pri paca estonteco flankon ĉe flanko kun li sub la verda stelo.
